HUNGARA VIVO

3
1977
8.- Ft



25 ÉVES
JARA

SZATMÁR BÚTORGYÁR
MEBLOFABRIKO

4700. Mátészalka, Felszabadulás útja
Telefon: 62. 447-503. Telex: 73233

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XVI. jaro 1977. 3-a numero

ENHAVO

Barna, Z.: La unuaj paŝoj 1
Zágoni, J.: Gábor Bálint 4
V. B.: El kio hungaroj lernas Esperanton? 6
Varga—Haszonits, Zs.: Géza Bárczi , 7
Balázs, A.: La knabo *(Golden,* E. kaj B.) 9
Pilinszky, J.: Poemoj *(Hules,* B.) 13
Király, F.: Hungara Hordirektistino *(VHZS)* 14
Pri muzikpedagogio de Kodály (Komp. I. *László)* 14
E. F. Panoramo 16
Szabó, M. R.: Revuo de Revouj 18
Fenyvesi, E.: Uzbekistana esperantisto 19
Jarkunveno de HEA 19
Komunikaĵo de E-organizaĵoj 19
Ferenc, L.: Medioprotektado *(Pechan, A.)* 20
Király, I.: Intervjuo kun M. Boulton 26
VHZS: Aventuroj de la „*Alexander*"-libroj 27
Benczik, V.: Zigzage tra Librolando 28
A. P.: Hungara Fervojista Mondo jubileas 29
De Giorgi, Aldo: Estas kiel vi 29
L. K.: Tibor Ujlaky-Nagy 29
Hlavathy, A.: Reklam' antialkoholika 29
Krucenigmo. Lingvaj ludoj 30
Humuro. Ŝako 31
Redakcia komunikaĵo 31
Leterkesto Korespondi deziras 32

Sur la titolpaĝo: Patrineco — foto de János Eifert.

LA UNUAJ PAŜOJ

La esperantistoj de la mondo ĉijare festas la 90-jaran datrevenon de la naskiĝo de Internacia Lingvo. Tio donas okazon rememori tiujn, kiuj dum la preskaŭ centjara historio de la movado disvastigis la lingvon kaj organizis la movadon. Nia artikolo prezentas, kiel konatiĝis kun Esperanto la Hungarlandaj laboristoj, kiuj estis la unuaj pioniroj de la laborista E-movado.

Komence de la 20-a jarcento jam disvolviĝis la movado ankaŭ en Hungario, dank' al inteelektuloj, *kiuj en Budapeŝto fondis la unuan esperantistan grupon en 1901.* La grupo faris entuziasman propagandon, organizis lingvokursojn unu post la alia, kaj en la ĉefurbo, kaj en provinco. Ankaŭ laboristoj vizitis la kursojn en Budapeŝto, ĉar ili rekonis la avantaĝojn de la IL. Kvankam unue tiuj laboristoj ofte nur interesiĝis, sed poste el ili fariĝis la unuaj pioniroj.

La disvastigon de E helpis ankaŭ personaj rilatoj. Ágoston *Marich,* sekretario de la menciita grupo, havis bonajn rilatojn kun la Budapeŝtaj preslaboristoj: lia patro, olda Ágoston Marich estis presisto ĉe la fama liberala ĵurnalo *Pesti Napló,* respektata ano de la presista sindikato. Pere de la olda Marich la grupo ligis kontaktojn kun la sindikato. Eluzante la eblecon, jam en novembro de 1907 oni komencis la unuan lingvokurson por sindikatanoj, gvidatan de Karlo *Mezei,* medicina studento, ano de intelektula grupo.



Titolpaĝo de la Unua Libro de doktoro Esperanto.

Tiun unuan kurson poste sekvis la ceteraj. En la sindikata hejmo de Budapeŝtaj presistoj preskaŭ konstante okazis inter 1909 kaj 1913 la instruado de la IL. La kursojn gvidis ofte Mezei, krome János *Medgyesi,* instruisto de meti-lernejo, Pál *Robicsek,* poŝtoficisto, Paulo *Balkányi* kaj aliaj.

La 2-an de aprilo 1910 raportis la ĵurnaloj, ke en Budapeŝto fondiĝis la Esperantista Societo „Laboro". *Ĉi tiu grupo estis la unua laborista E-grupo en Hungario.* La iniciatintoj motivis la apartan organizadon per tio, ke ĉe la inteelektuloj estis tro altaj la membro- kaj lernokotizoj, kaj tial la

grupo „Laboro" decidis komenci senpagajn kursojn por laboristoj. Jam la unua alvoko de la grupo anoncis, ke ĝia sekretario estas Ferdinánd *Varga,* ĉe kiu oni povas aliĝi al la kurso. La unua kurso finiĝis en junio, kaj tuj komenciĝis la dua (:VI., Lomb-str. 13.:), kaj la tria, en laboristohejmo de *Újpest.* En oktobro 1910 la grupo komencis progresan lingvokurson en kafejo *„Intim",* sur angulo de nuna Gutenberg-placo, apud la preslaborista sindikatejo. (Verŝajne je fino de la jaro jam ekzistis ankaŭ du subgrupoj en la menciitaj ejoj.)

Komence de oktobro 1910 fondiĝis la dua grupo, la „Espero" Hungara Laborista Socieo Esperantista, en avenuo Váci 97. (XIII. distr.) en ferlaboristo-hejmo. Post kelkaj semajnoj la socieo fondis sian subgrupon en la muelista sindikata hejmo (XIII., avenuo Lehel 8/a).

Ambaŭ societoj vigle funkciis en la jaroj 1910—1911, sed fine de decembro 1911 i iaj nomoj kaj komunikaĵoj malaperis el la ĵurnaloj.

La pluan evoluon de la laborista E-movado forte influis la eventoj de la internacia laborista movado esperantista. En 1912 komenciĝis debato pri memstara internacia laborista federacio esperantista. La partoprenintoj de la debato konsentis pri neceso de tia internacia laborista organizaĵo, tamen la opinioj diverĝis pri ties organiza konstruo.

La esperantista socieo de francaj socialistoj, „Esperanto-Sekcio Franca de la Internacia Organizaĵo" proponis apartan mondorganizaĵon nur por la socialdemokrata esperantistaro. La Ĉeĥa Laborista Esperantista Asocio volis unuigi ĉiujn klasbatalajn politikajn tendencojn en „Internacia Laborista Federacio Esperantista". La ĉeĥan proponon komunikis revuo de ĈLEA „La Kulturo", en junio 1912. Ĝin transprenis ankaŭ la „Internacia Socia Revuo" en julio. La Budapeŝtaj laboristaj esperantistoj konis la debaton, ja inter ili estis abonantoj de ISR. Ĝuste tiam venis hejmen el Parizo la internacie konata esperantisto Izsó *Polgár,* verŝajne bone informita pri la supraj problemoj. Polgár tuj komencis lingvokurson en la presista sindikatejo, kaj en septembro li alvokis la preslaboristojn anonci sin ĉe li, por fondi presistan esperantistan grupon.

La 27-an de decembro 1912 aperis alvoko en la socialdemokrata ĵurnalo *Népszava* (Voĉo de l'popolo), kiu sciigis la legantojn pri fondiĝo de „Federacio Internacia de la Socialista Esperantistaro" — socieo de Budapeŝtaj socialdemokratoj. La „Federacio" komencis funkcii en Szent László-str. 172. (nun XIII., Mauthner S. str.). Mem la nomo de la „Federacio" respegulas la francan influon, kion pruvis post kelkaj monatoj ankaŭ artikolo en Internacia Socia Revuo, sciigante, ke fondiĝis hungara socialdemokrata asocio, kiu akceptis la regularon de ESFIO.

Tamen la nomo de la „Federacio" post kelkaj semajnoj ŝanĝiĝis. La 9-an de februaro 1913 la „Federacio" eldonis alvokon sub la nomo „Esperantista Federacio Hungara de la Internacia Organizaĵo", kaj komunikis, ke la „Federacio" volas unuigi ĉiujn klasbatalajn laboristojn. Tio jam respegulas la influon de Ĉeĥa LEA!

La nomŝanĝo de la „Federacio" ne tuŝis ĝian laboron: ĝi organizis lingvokursojn unu post la alia

Sipokskurso de mil esperantistoj al Vieno, 1923.

Hungarujo. Inter la hungarlandaj socialdemokratanoj fondiĝis Esperantista Federacio, kiu celas organizi la hungarlandajn Esperantistajn samideanojn, kaj klopodos federaciiĝi kun la alilandaj socialistaj societoj.

La federacio akceptis la regularon de E. S. F. I. O.

Komunikaĵo de Internacia Socia Revuo pri „Federacio", 1933.

Hungarlanda Esperantista Socieo Laborista estas la titolo de socieo, fondita antaŭ kelkaj monatoj en Budapeŝto. Tuj post la fondo la socieo aranĝis 5 kursojn, al kiu ĉeestis pli ol 120 gelaboristoj; tiuj kursoj ĵus finiĝis kun kontentiga sukceso. La komitato de l' suprenomita societo nun preparas grandan propagandon por la proksima vintro, kaj celas fondi grupojn en tuta Hungarujo.

Neniu laboristo devos ignori la ekzistadon kaj kialon de Esperanto!

Komunikaĵo pri fondiĝo de HESL (1913). Internacia Revuo.

en la ŝuista sindikatejo (XIII., Lomb-str. 13.) kaj faris propagandprezentadon en laborista hejmo de antaŭurbo *Pesterzsébet* (nun XX-a distr.). El la anaro de la „Federacio" nur kvin nomoj estas konataj: Lajos *Bánóczy,* Ferenc *Vági,* József *Erdős,* József *Madari* kaj Mór *Czinger,* komisiuloj de la „Federacio" por registri la aliĝantojn al la lingvokursoj. La ceteraj nomoj malaperis kune kun la „Federacio". Ni ne scias precize, kiuj fondis tiun organizaĵon.

Laŭ mia opinio la iniciatintoj estis anoj de la grupoj „Laboro" kaj „Espero", pli precize: anoj de la kursoj kaj subgrupoj de tiuj societoj. La centro de la „Federacio" funkciis en la najbara strato, tre proksime al ejo de la grupo „Espero". La ejo de lingvokurso de la grupo „Laboro" kaj tiu de la „Federacio" estis la sama (Lomb-str. 13., kie verŝajne estis malgranda drinkejo).

La „Federacio" ankoraŭ funkciis en februaro kaj marto 1913, sed la ĵurnalo Népszava jam komunikis: la *22-an de februaro fondiĝis* „Hungara Esperantista Societo Laborista"' sub prezido de Izsó Po'gár. HESL sekvis la ekzemplojn de la najbarlandaj societoj: ĝi estis LEA, simile al la ĉeha kaj germana asocioj. Fondintoj de la nova organizaĵo estis precipe presistoj, disĉiploj kaj amikoj de Izsó Polgár, sed verŝajne inter ili estis ankaŭ iamaj anoj de la grupo „Laboro", kies hejmo, la kafejo „Intim" troviĝis apud la preslaborista sindikatejo sur la Gutenberg-placo.



(La fotokopion sendis Bérczi Balázs, Cluj.)

Do, en februaro kaj marto funkciis du laboristaj E-societoj en Budapeŝto: la „Federacio" kaj HESL. La „Federacio" baldaŭ malaperis, verŝajne solviĝis en HESL, kiu iĝis daŭra organiza kadro de la Hungarlanda laborista E-movado inter la jaroj 1913—1934.

El la iamaj fondintoj de HESL vivas nur József *Nagy.* Li estis aktiva esperantisto dum la tuta ekzisto de la societo, en la 20-aj jaroj li eĉ estis ofte ano de la centra gvidantaro de HESL — kaj ankoraŭ nun li estas fidela kaj entuziasma adepto de la IL.

Okaze de la datreveno ni rememoras kun estimo pri la unuaj pioniroj, kiuj levis alten la verdstelan standardon de interpopola amikeco.

Zoltán *Barna*

Partoprenantoj de standard — inaŭgurado, 1922

GÁBOR BÁLINT

D-ro Gabrielo Bálint.

Nun, kiam ni jubileas la 90-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto, ĉi-okaze estas inde rememori ankaŭ pri la patro de la hungaraj esperantistoj, pri la eminenta lingvoscienculo kaj mondvojaĝanto d-ro Gábor *Bálint*. Pri tiu homo, kiu unuan fojon en la historio de la Internacia Lingvo, el universitata katedro heroldis la ideon de monda komuna lingvo.

Gábor Bálint naskiĝis la 13-an de marto 1844, en la Transilvania vilaĝo *Szentkátolna* (nun *Catalina*, Rumanio), el malriĉa, multinfana sikula* familio. Kiam li eminente finis la gimnazion en *Nagyvárad* (nun *Oradea)*, jam estis lerninta la anglan, araban, francan, germanan, hebrean, italan, latinan, novgrekan, persan kaj turkan lingvojn. En Vieno kaj Budapeŝto li studis teologion kaj juron, akirante ambaŭ diplomojn. Tamen, lia ĉiama inklino estis la studado de lingvoj, kaj tio difinis lian sorton kaj vivovojon.

Jam dum liaj universitataj studoj la Hungara Scienca Akademio komisiis lin vojaĝi orienten, por studi la lingvojn de la ural-altajaj popoloj kaj ilian etnologion. Per esplorado de tiuj lingvoj li studis la interrilatojn inter la hungara kaj aliaj tn. parencaj lingvoj.

Dum lia unua vojaĝo (1871—1874) li esploris tiun temon en Kazano, Peterburgo, Astrahano, Krasnojarsko, Irkutsko, Urga (Ulanbatoro). La rezultoj de tiu laboro: *Tatara krestomatio, gramatiko kaj vortaro* (I—III. Budapeŝto, 1875—1877); *Mongolaj studoj* (Budapeŝto, 1876). Dum tiu periodo estis eldonita ankaŭ lia *Turka lernolibro* por hungaroj (Budapeŝto, 1875).

Intertempe grafo *Béla Széchényi* invitis lin al Azia ekspedicio, al Hindio, Japanio, Tibeto kaj Birmao. Malsaniĝinte, Gábor Bálint devis veni hejmen, sed ne tute senrezulte. La grandvoluma materialo, kolektita tiam, estis pli malfrue eldonita en hungara kaj germana lingvoj, kiel *Tumalaj studoj* (Budapeŝto, 1897.).

Post longtempa studado de la orientaj lingvoj, la lingvisto Bálint supozis, ke la mongola lingvo estas en pli proksima parenceco al la hungara ol la finna. Tiu erara ideo estis tiam nepardonebla peko en la okuloj de gvidantoj de la filologia fako de l' Akademio. Ili malhelpis la eldonon de aliaj pluaj verkoj, malhelpante reokupi lian katedron ĉe la Budapeŝta Universitato. Pro tiu neglekto Bálint ĉagreniĝis. Li decidis forlasi sian patrion, vivonte dum 13 jaroj en volontula ekzilo. Li serĉis sian bonŝancon en sudaj kaj orientaj landoj. En *Turkio* li studadis la regionajn dialektojn, en *Hispanio* li estis oficisto, en *Damasko* financa kontrolisto, en *Bagdado* sultana konsilanto, ĉe la *Atena Universitato* profesoro de la araba kaj novgreka lingvoj. En Bosnio kaj Libano li vivis kun sia edzino en mizeraj cirkonstancoj.

Per longtempa persvado, fine, liaj amikoj sukcesis decidigi lin al hejmenveno.

En la jaro 1893 en *Kolozsvár* (nun Cluj-Napoca) ĉe la tiea Universitato oni fondis speciale por li katedron, de kie li lekciis la japanan, turkan, tataran, mongolan, manĉuran, korean kaj finnan lingvojn.

Gábor Bálint, jam en Ateno, aŭdis pri la Internacia Lingvo Esperanto. Sed nur printempe de 1897 li iĝis por ĉiam adepto de l' afero. Tiam li legis la artikolon de *Gaston Moch,* aperintan en *„Indépendence Belge"*, kies redaktoro estis mem Moch. De li ricevis la *6-an de majo 1897* profesoro Bálint, la unuan Esperantlingvan leteron, la lerno-

libron *Manuel Complet* kaj la adresojn de *Beaufront* kaj *Zamenhof*. La 14-an de majo s-ro Moch jam atentigas profesoron Bálint pri la neceso de lernolibro por hungaroj. Beaufront, la *18-an de majo*, kun granda ĝojo skribis al Bálint, ke „*... la aliĝo de tiaj homoj kiel vi, havas apartan gravecon por nia sankta entrepreno. Ju pli viroj eminentaj per sia scienco venos al ni, des pli rapide ni atingos la celon.*" En la sama tago *d-ro Zamenhof* skribis la unuan respondleteron adresitan al Bálint. Verŝajne, fiere li legis la opinion de Zamenhof pri la rezulto de sia dusemajna lernado: „*Via letero estas skribita tre bone kaj sen eraroj. ... mi permesas al mi esperi, ke dank' al via amikeco, nia afero baldaŭ trovos tie tiel same varmajn amikojn, kiel en la diversaj aliaj landoj.*"

Tuj post la ricevo de la Zamenhofa letero, Bálint komencis vastan agadon por Esperanto. Li eldonis litografite la gramatikajn regulojn de la lingvo, aperigis artikolojn pri tiu temo kaj organizis la unuan kurson en kadro de la universitato. Post unu monato li informis d-ron Zamenhof, ke oni komencis prepari lernolibron por hungaroj, kiun eldonis *Ábel Barabás*, lia disĉiplo (jam ankaŭ ĵurnalisto) post kelkaj monatoj. La verko *Esperanto Világnyelv* (Mondlingvo Esperanto) (Budapeŝto, 1898.) laŭ *P. Nylén:*" *... estas la plej bona kaj plej kompleta inter ĉiuj.*"

Ekde la fondiĝo (1904) Bálint partoprenis ankaŭ en la lingva kaj scienca estraro de la Internacia Scienca Revuo.

Dank' al la tiama fortostreĉo de Bálint kaj de lia disĉiplo Ábel Barabás, la dissemita grajno ankaŭ en Hungario ekĝermis kaj dum jaroj fariĝis vivkapabla kaj fruktodona.

Esperantistoj ĉe tombo de G. Bálint, en Kézdivásárhely.



Letero de Zamenhof al G. Bálint.

La prestiĝo de Bálint kreskis de tago al tago. Li partoprenis internaciajn lingvistikajn kongresojn, ekspedicion en Azio, eldonis serion da sciencaj verkoj. En multaj gazetoj kaj revuoj aperis liaj historiaj, lingvistikaj studoj kaj artikoloj.

La finno-ugra lingvoteorio venkis ankaŭ en Kolozsvár. La novaj kaj malnovaj malamikoj de Bálint denove komencis ataki liajn opoziciajn tezojn, eĉ lian vivon faris netolerebla. Post longa batalo li laciĝis, kaj iom post iom malproksimiĝis de la homoj. Forlasante la katedron li iĝis pensiulo en aĝo de 69 jaroj., kaj post unu jaro, la 26-an de majo 1913 li subite mortis.

Lia modesta tombo en *Kézdivásárhely* (nun Tg. Secuiesc) estas nun pilgrimejo de esperantistoj. Li oferdonis sian tutan vivon al plivastigo de la universala kulturo kaj de Esperanto. La tuta verkaro de Gabrielo Bálint fortigas la amikajn rilatojn inter la popoloj.

Jenő *Zágoni*

---

* *Sikuloj: hungara popolgrupo en orienta Transilvanio (nun en Rumanio).*

Fragmento el la hungarlingva studo pri G. Bálint, aperinta en ALUTA VI—VII., p. 377—389. (Sf. Gheorghe, Rumanio).

El kio hungaroj lernas Esperanton?



D-ro Ábel Barabás.

La hungara nacio — kies lingvo ne estas hindeŭropa — estis ĉiam fekunda grundo por Esperanto. En la tempo de debuto de la Internacia Lingvo nia nacio vivis en dualisma ŝtato kun Aŭstrio, kaj tial la socia tavolo, kiu havis la eblon kontaktiĝi kun eksterlandanoj, relative bone regis la germanan lingvon. Ne estas do mirinde, ke la historio de Esperanto en Hungario komenciĝas nur en 1897, kaj eĉ tiam en la orienta parto de la lando, en la Transilvania urbo *Kolozsvár* (nun en Rumanio *Cluj-Napoca),* kie la influo de la germana lingvo estis malpli forta.

La unua hungara pioniro estis elstara persono: d-ro Gabrielo *Bálint,* univ. profesoro pri orientaj lingvoj (v. artikolon pri li sur paĝo 4.) Li eldonis litografite por siaj kursanoj la regulojn de E (bedaŭrinde ne postrestis el ĝi ekzemplero); tial oni konsideras ĝin kiel la unuan Esperantan lernilon por hungaroj.

La unuan veran lernolibron fakte verkis Ábel *Barabás: Esperanto világnyelv* (Mondlingvo E), kaj aperis same en Kolozsvár unu jaron poste, en 1898, v. paĝo 5.) Tamen, surbaze de remomoroj de P. *Lengyel* en *Literatura* Mondo 1922/1. kaj laŭ listo »Literaturo de la lingvo internacia Esperanto ĝis 1. januaro 1898« en la revuo *Lingvo Internacia,* ne maleblas, ke la libreto eliris jam en 1897. Ĝi havas en tiu listo la numeron 114, kio signifas, ke ĝi estis la 114-a libro aperinta pri aŭ en E. Favora recenzo aperis pri ĝi en Lingvo Internacia 1898/4, kiun tiutempe redaktis Paŭlo *Nylén* en Svedio. La unuaj hungaraj pioniroj — ankaŭ la internacie konata Paŭlo Lengyel — lernis el tiu libreto.

Lengyel jam kvin jarojn poste, en 1903, aperigis sufiĉe bonan gramatikon por hungaroj, verkitan kunlabore kun *Miletz* kaj *Schwőrer.* En la antaŭmilita periodo aperis multaj lerniloj por hungaroj. Ilin karakterizas — kiel probable ankaŭ en aliaj landoj — maldikeco, malgranda eldonkvanto kaj relative malalta metodologia kulturo. En 1910 aperis gramatiko de J. *Medgyesi,* kaj tri jarojn poste gramatiko de I. *Polgár.* La lernolibro de *Polgár* fariĝis tre populara: ĝi aperis en almenaŭ sep eldonoj. En la jaro 1910 aperis ankaŭ Esperanta frazlibro de R. *Schatz;* post dek du jaroj, en 1922 li eldonis hungaran-Esperantan vortaron. Ne mankis lerniloj ankaŭ en la intermilita periodo, kvankam sendube la plej talentaj esperantistoj tiam aktivis en la literaturo, tamen aperis pluraj lernolibroj i. a. de *Baghy, Szilágyi, Kökény, Baranyai, Kalocsay.* La plej atentinda verko estis la relative ampleksaj Hungara-Esperanta kaj Esperanta-Hungara vortaroj de János *Tomán.* Tiu ĉi verko servis dum ĉ. 40 jaroj la hungaran movadon.



ESPERANTO

VILÁGNYELV

GYAKORLATI ÉS ELMÉLETI MÓDSZER A ZAMENHOF-FÉLE VILÁGNYELV NÉHÁNY NAP ALATT VALÓ MEGTANULÁSÁRA

NYELVTANNAL,
GYAKORLATOKKAL ÉS SZÓTÁRRAL.

ÍRTA

BARABÁS ÁBEL.

ELŐSZÓVAL KILÁTÁSBA DR. BÁLINT GÁBOR EGYETEMI TANÁR.

KOLOZSVÁR
1898.
A SZERZŐ KIADÁSA.

Titolpaĝo de la unua lernolibro en Hungario, de Á. Barabás.

Post la dua mondmilito oni reeldonis kelkajn el la intermilitaj lerniloj, sed la ekprogreson rompis la malvarma milito. Vera ekflorado komenciĝis tamen en 1958 per la vortaroj de A. *Pechan* (ĝis nun ili aperis en kvar eldonoj.) Jaron poste eliris *Eszperantó nyelvkönyv* (E-lernolibro) de Julio *Baghy,* ĝis nun en preskaŭ 100 000 ekzempleroj. Meze de la sesdekaj jaroj aperis la modernmetoda lernolibro de I. *Szerdahelyi: Esperanto 1.* kaj *Esperanto 2.* Populara internacia varianto de *Esperanto 1.* estas *Esperanto Internacia.* La suma eldonkvanto de la lernolibroj de *Szerdahelyi* atingas 50 000 ekzemplerojn. Szerdahelyi verkis en 1972 specialan lernolibron ankaŭ por universitataj studentoj.

En 1967 la plej grandan furoron havis *Gvidlibro por supera ekzameno* redaktita de A. *Pechan.* Tiu internacie uzata studlibro aperos kompletigite en 1977. En 1970 aperis nova lernolibro de L. *Kökény.* Specialan lernolibron verkis d-ro H. *Hegedűs* por pioniroj: ĝi estas oficiala eldonaĵo de la pionirmovado.

Aparte bonŝancaj estas hungaroj havante en sia lingvo koncizigitan, tamen sufiĉe detalan (246-paĝan) varianton de *Plena Gramatiko,* verkon de *Kalocsay* (jam du eldonoj, 20 mil ekz.). Alian valoran libron verkis Kalocsay kun Ada *Csiszár: Domfabriko.* Ĝi — kvankam kelkloke diskutinda — donas grandan helpon al seriozaj studantoj de la lingvo.

Aperis ankaŭ legolibreto por progresantoj: *Ŝercoj, rakontoj* (de la subskribinto) ĝis nun vendiĝis du eldonoj. Al korespondemuloj donas helpon *E-hungara lerneja korespondado;* bone uziĝas ankaŭ la *Esperanta konversacia frazaro* de I. *Nagy* kaj J. *Mátéffy,* aperinta jam dufoje.

Ĉiuj lerniloj post 1958 — krom tiu de Kökény kaj Domfabriko — aperis ĉe ŝtata eldonejo de lernolibroj, kio signifas, ke ili ĝuis grandan subvencion el la ŝtata buĝeto. Rezulte de tio ili estas malmultekostaj: ekzemple la prezo de *Esperanto Internacia* ne atingas la duoblon de la meza hungara horsalajro.

Ĉe la 90-jara jubileo de Esperanto oni povas konstati, ke en nia lando ne mankas lerniloj. Ĉirkaŭ deko da ili troviĝas konstante sur la merkato en sufiĉa eldonkvanto, je modera prezo. Pliaj lerniloj por specialaj bezonoj kompreneble estus bonvenaj, kaj oni multe strebas por verkigi tiajn. Ĉiukaze, por signife prosperigi Esperanton dum la venonta jardeko, la demando de lerniloj esence povas esti konsiderata kiel solvita.

V. B.

Géza Bárczi, la esperantisto

Lasta portreto de d-ro Géza Bárczi

Kiam en novembro de 1975 la hungara lingvoscienco adiaŭis profesoron Géza Bárczi, la plej grandan hungaran lingviston, esploriston de l' pasinto kaj nuntempo de la hungara lingvo, malmultaj sciis, ke en lia persono ankaŭ la esperantistoj kaj la esperantologio perdis sian elstaran saĝulon kaj scienciston.

Profesoro Bárczi dum sia tuta vivo fervore okupiĝis pri la problemaro de internacia lingvo; en kelkaj periodoj de lia aktiva agado eĉ pere de artikoloj defendis la ideon de internacia lingvo, konigante siajn pensojn, tezojn kaj batalante kontraŭ la konservativa sinteno de bedaŭrinde multaj lingvistoj kaj sciencistoj.

La labormaterialo por Géza Bárczi estis la pasinta kaj nuntempa hungara lingvo, sed li ĉiam elformis sian konceptaron sur larĝaj bazoj de sia profunda klereco, de la ĝisfunda kono de multaj lingvoj kaj ĝenerale de la lingvo mem. Tiu klereco estis tia, kiu ne juĝis antaŭ ol detale ekzameni la juĝoton. Tiu vojo gvidis lin ĝis la prikonsidero de internacilingvaj problemoj.

Géza Bárczi en du periodoj de sia vivo okupiĝis intense pri Esperanto: en la junaĝo kaj en la lastaj dek jaroj. Sed pri lia daŭra interesiĝo por Esperanto atestas la valora, kelkcentvoluma biblioteko, kolektita de li dum longaj jardekoj.

Géza Bárczi naskiĝis en 1894 en *Zombor*. Kiam en 1911 estis akceptita en la fama, altnivela Eötvös-Kolegio (en la fakoj de germana kaj turka lingvoj), li jam parolis E-n kaj laŭ lia aserto, tio faciligis lernadon de aliaj lingvoj. Poste lia kariero altiĝis en rekta direkto: mezlerneja instruisto, universitata docento kaj profesoro — en *Debrecen* kaj en *Budapest* —, akademiano, honorita per altaj ŝtataj premioj.

Neniu pensus, konante lian vivoverkon, ke funde de lia koro kaŝiĝis poeto kaj verkisto, tradukisto. Géza Bárczi aperis en la Esperanta medio en 1909, pere de sia poemeto: *La stelo.*
Jen fragmento:

Super mar' brilanta stelo
Staras sur la blučiel'
En ventegoj, kiel celo,
Kondukas al la ter'
La ŝipeton de l'homaro,
Kiun pelas la ondaro.

La Verda Standardo, organo de Hungarlanda Esperanta Societo (HES) donis publikeblon al la poemo kaj aliaj literaturaĵoj de la juna filologo. En la sekvaj jaroj — ĉ. ĝis la unua mondmilito — li aperigis multajn tradukaĵojn, ĉefe rakontojn, novelojn *(Viktor Rákosi: Rakontoj de la ĉerkesa kapitano, Károly Lovik: La Morto de Heroo, Fabelo el la tatara lingvo, ktp.), ĝenerale sub pseŭdonimoj (Dusano, Cezaro Bárczi, COBO).* Tamen la ĉefaj tradukoj el tiu tempo estas la poemo de *Petőfi: La maljuna drinkejestro*, kaj sep scenoj el la *Tragedio de l'Homo, de Madách*, tradukota baldaŭ far Kalocsay. Lia traduko atestas pri brila literatura kaj stila talento; krom la *Shakespeare*-a Hamleto, eble la *Madách*-a Tragedio estas la unusola verko tradukita en Esperanton far du samtalentaj verkistoj.

Sed tiutempe ne fremdis al li eĉ la ĵurnalismaj ĝenroj: en *La Verda Standardo*, kies ĉefredaktoro li estis dum mallonga tempo, sisteme aperis liaj „ĉefredaktoraj felietonoj", krome recenzoj, lingvopolitikaj artikoloj.

En tiuj junaĝaj jaroj li laboris ankaŭ en la movado, instruadis, vizitadis klubojn, kaj la spertojn de tiu agado li sistemigis en siaj movadaj artikoloj.

Kaj jen, post tiaj produktivaj jaroj — „Cezaro" Bárczi malaperas el Esperantio. La rektajn kaŭzojn neniu scias, sed verŝajne lia konscia destiniteco por la lingvistiko kaj por la hungara lingvo forrabis ĉiun momenton de liaj labortagoj. Tamen, la notoj en liaj Esperantaj libroj pruvas, ke Géza Bárczi ĉiam trovis tempon por tralegi ĉiun Esperantaĵon, kiu atingis lin. Tiel li gardis kaj evoluigis sian lingvoscion; kvazaŭ la profesoro suspektus, ke iam alvenos la tempo, kiam li repaŝos la esperantistan scenejon.

Kaj vere alvenis tiu tempo. Estas jam en la 50-aj jaroj, kiam la movado ekscias, ke profesoro Bárczi estas esperantisto. Interesa historia momento: Kálmán *Kalocsay*, kvankam persone ne konis la profesoron, en 1954 sendis al li Esperantlingvan lete-

Noto. Baldaŭ aperos Bárczi-memorlibro en la eldono de la Budapeŝta universitato, kadre de la serio „Esperantologiaj Kajeroj".

ron, esprimante al profesoro Bárczi sian admiron pro la Etimologia Vortaro (de la hungara lingvo). Samtempe li sciigis sian suspekton, ke tiu alitempa „Cezaro Bárczy" kaj profesoro Géza Bárczi estas la sama persono. Bárczi respondis ankaŭ Esperante al Kalocsay: jen, malkovriĝis identeco de la du Bárczi. Lia reviviĝinta aktiveco komenciĝis en 1958, kiam aperis la E—H vortaroj. Li skribis E-lingvan leteron al la redaktisto A. *Pechan*, esprimante sian laŭdon, kontenton kaj ĝojon pri la vortaroj, — tamen menciante sian dubon pri la utilo kaj neceso de la multaj neologismoj. Post ricevo de la letera respondo li baldaŭ telefone kontaktiĝis kun la redakisto en perfekta, flua Esperanto, — kvankam li konfesis, ke *post paso de pluraj jardekoj nun ta unuan fojon li parolas E-e.* — Sekvis personaj renkontiĝoj, eĉ lia persona partopreno en kunveno de E-klubo Konkordo, kie li — la unuan fojon publike parolis —, kaj la plej grava: Bárczi akceptis la rektoran funkcion en la Somera E-universitato dum la Budapeŝta Universala Kongreso de Esperanto en 1966. (Pro neatendita malsano lian inaŭguran prelegon prezentis Regulo *Perez).* En sama jaro la hungara radio — pere de la ĵurnalisto esperantisto Imre *Szenes* — dissendis tre interesan hungarlingvan konversacion kun li pri la „Nuntempa latino". Sekvis publika diskuto sur paĝoj de la grava hungara jurnalo — *Népszabadság* — kun la titolo: „Ĉu iu ajn povas ellerni fremdajn lingvojn"? La interveno de la profesoro en tiu diskuto pozitive informis la legantojn pri la problemaro de multlingveco kaj Esperanto. Alia evento, kiun Géza Bárczi persone partoprenis, estis la inaŭguro de la Esperanto-restoracio en marto de 1968.

Tiutempe en la *Universitato Eötvös Loránd* jam de jaroj funkciis la Esperanto-fako. Profesoro Bárczi laboris sur la tria etaĝo; la E-fako sur la dua. Do, kun kiu ajn problemo oni devis nur kelkajn ŝtupojn supreniri, ĉar la profesoro — kvankam ege okupita — ĉiam akceptis la esperantistojn en sia kabineto: pordo malŝlosita, se temis pri aferoj de la internacia lingvo. Lia reputacio multe kontribuis al la rekono de Esperanto-fako.

En la lastaj jaroj de sia vivo, kompreneble, li jam ne tre ŝatis la publikecon — sed ni aldonu, ke ĝin li neniam ŝatis, pli emis resti en la fono —, kvankam estis elektita *honora prezidanto* de HEA. Tiun socian pozicion li rekompencis per daŭra verkado de altvaloraj artikoloj, en kiuj la elstara lingvisto konvinke, science —, sed kun interna fervoro argumentis por Esperanto, por la neceso de internacia helplingvo; li pruvis, ke naciaj lingvoj neniam povas fariĝi veraj interpopolaj komunikiloj. Pere de tiatemaj artikoloj li multe altigis la reputacion de niaj revuoj, *Hungara Vivo* kaj *Eszperantó Magazin (Lingva valoro de Esperanto, La morto de lingvoj ktp.).*

Jam morte malsana, en la malsanuleja lito, per freŝa spirito li subskribis la leteron al la hungaraj parlamentanoj, petante, ke parlamenta komisiono okupiĝu pri la problemo de internacia lingvo.

Por nia profesoro la hungara lingvo estis la granda, dum la tuta vivo daŭranta amo; kaj Esperanto — la neniam forlasebla pasio.

La agado de Géza Bárczi nerevokeble pruvas al ĉiuj nekredemuloj, ke la gepatra lingvo kaj la internacia lingvo neniam fariĝas malamikoj.

Zsuzsa *Varga-Haszonits*



La naskiĝ-domo de Zamenhof
En ĉi-tio ĉambro naskiĝis Dro Zamenhof

La loĝdomo de
Dro. L. L. Zamenhof autoro de Esperanto
Strato Zamenhof kaj Brudna en Bialystok (Polio)

Anna Balázs:

LA KNABO

De ekstere la novaj neonaj stratlanternoj enĵetis akran lumon. La alitempa mola, milda obskuro malaperis; la mistero kaj la areaneaĵa gricezo de la angulo j de la ateliero solviĝis en la invadanta lumo. Sub la alta tegmento, en la mezo sur stablo, la lumo ĉirkaŭprenis la disvolviĝantajn konturojn de span-granda pretiĝanta nudvirina figuro modlita el argilo.

La maljuna skulptisto grumblante iradis tien kaj reen. Li koleris kontraŭ la fremda, invadanta lumo, kiu ŝanĝis la ombroludon sur la skulptaĵoj kaj surmuraj pinglitaj desegnaĵoj.

Li ne trovis sian lokon. Plivastiĝis la ateliero kaj muroj de la loĝejo tie supre, — kvazaŭ defalus iaspeca sekreto, kiu ĝis nun envolvis lin en protektan obskuron. Jes, jes, li trovis la vorton: kvazaŭ granda, fremda okulo konstante rigardus, rigardus, gvatus liajn intencojn, antaŭ ol tiuj aperas en skulptaĵo ... Ej, stulta entrudo, kial estas ĉi tiu brutala lumo, senhonta lumigado malkaŝanta la angulojn ... kun ĝi enpenetris la ekstera mondo, kvazaŭ ankaŭ bruo enŝoviĝis kun ĝi ... ankaŭ fremda korpodoro! Fi! Kaj homoj! homoj!

Homoj, kiujn li malamis, kiujn li neniam povos pardoni.

Enrampis la mondo, kiu forlasis lin. Ĝi tiris sur lin la ĉerko-kovrilon de la soleco, antaŭ ol li mortis.

Kiomfoje li disputis kun ili en si mem dum la pasintaj jaroj. Mi ne mortis! — li kriis al la musodora silento kaj paŝetis al la mur-bretoj; en la obskuro li karesis siajn skulptaĵojn per tremantaj manoj, per siaj fingro-pintoj li tuŝis la duone fermitajn aŭ malfermitajn okulojn, ĉirkaŭpalpis la kolojn, fingrumis la angulojn de la buŝoj kun kaŝitaj ridetoj; lia mano glitis sur rondajn virinajn mamojn, junajn virkorpoj n kun strečitaj muskoloj.

Pro ĉi tio forpasis lia febro kaj li ekspiris. Vivas, vivas la verkoj, kiujn envolvis la obskuro. Ili atendas.

Li sciis, ke ili atendas, ke li fermu siajn okulojn. Li sciis precize, ke ili atendas lian morton. Kiam li mortos, ilia vivo komenciĝos.

Tiam ili ekiros en la mondon al la vivo. Ili elmontros sin al la homoj; en la helo aperos la lumo sur ilia frunto.

Homoj venos, manoj skribos liniojn, la gazet-kolumnoj sciigos: „Mortis la plej granda artisto."

Če lia tombo oni faros longajn paroladojn. Muziko eksonoros, priplorantaj akordoj pezaj kiel la tero; floroj falados, eble ankaŭ larmgutoj. Iu flustre klarigos, ke vere ne estis tiel, nek ĉi tiel: oni alte taksis lin, amis lin kaj sciis, kiu ...

Jam plurfoje li preparis sin por la ribelo. Sed li atingis nur tiun punkton, ke iam li aĉetis verdan palmon kun grandegaj folioj kaj flavan kanarion, senpolvigis sian hejmon kaj kovris la ŝtuparon al la ateliero per longa, kolora tapiŝo. La homoj devus veni, trapaŝi la tapiŝon, halti apud la etenditaj folioj de la palmo, atenti la ĉirpadon de la birdeto unu minuton, poste rigardi la nudaĵon „Dormanta Virino" kuŝantan sub la palmo, emociiĝante paŝi plue tute ĝis la profundo de la ateliero, kie liaj aŭdacaj, individuaj desegnaĵoj plenigas la muron. Tie staris sur la meza desegnaĵo la „Nuda Virino", apoganta sin sur bastono, impertinente, kun rektigita korpo, kiel ia virina kavaliro ... Antaŭ ŝi sur la planko la genuanta torso, la „Cilindroĉapelita Viro", brakumanta glatan, ruĝan virinan korpon, perdanta sin en la sorĉo de karno, vizaĝ-alfronta kun varmega alteniĝo. Kaj en la malantaŭa angulo la ĉarmege bela knabfiguro, ĵus ekdorminta, duone malantaŭen kliniĝanta, kvazaŭ ĝi estus sorĉita de sia propra beleco.

Li dissendis invitilojn.

Neniu venis. Nur la silento grimpis pli kaj pli alten, kiel mistera akvo, pro kiu la akvonivelo, fontinte de iu profundaĵo, leviĝas, kreskas, kreskas, kovras la muron, plenigas la tutan vivon per malvarmeta, mortodora silento.

Unue la palmo mortis. Unu post alia flaviĝis kaj defalis ĝiaj grandaj folioj; per terura morto ĝi forpasis, senkomprene kaj sen helpo. Nur li forvišis pro ĝi bruligan larmon en la angulo de siaj okuloj.

Alian matenon li trovis la kanarion falinta, mortinta, alkroĉiĝanta al la nenio per siaj supren rigidiĝintaj, senkulpaj ungegoj. Haltis ĝia koro. Li sciis, kial.

Ĉar neniu povis resti kun li ĉi tie, enfermita kune kun la morto, kun lia propra morto, kiu obstine,

senĉese kaŝobservas la momenton por povi lin kapti. Sed li ne permesas tion. Persiste li eltenas. Li devas ankoraŭ vivi inter siaj skulptaĵoj, ĉi tie li ĝuas strangan, timigan protekton. Ekstere la mondo, vestita en stultaj lumoj, ĵetadas sin al la nenio. Sed li, kiel inter ŝton-duraj fortikaĵ-muroj, eniĝinte en sian arton — praa helikokonko — elportas ĉion. Jarmiloj premas lin, la morta kaj timiga silento de jarmiloj premegas lin en la direkto al la morto. Sed li ne cedas, li ankoraŭ devas krei, kun tremantaj manoj, daŭre pelata de la sopiro pri majstroverko. La homoj, floroj, birdoj povas morti; li devas vivi.

Sed neniu kaj nenio tuŝu tiun ŝelon, kiu estiĝis ĉirkaŭ li el tiu terure granda forto. Ĉar povas esti, ke la tuŝo de aero disfaligos ĝin, kiel disfalas la fosilio, kiam oni dispecigas ĉirkaŭ ĝi la glacion, kiu per sia kiraso enplektis kaj gardis ĝin dum jarmilionoj.

Nun tiuj ĉi lumfaskoj ... turmentaj!

La ateliero plivastiĝis pro ili kaj samtempe ... jes, samtempe ĝi fariĝis ankaŭ pli malgranda. La ombroj forflugis de la belaj vizaĝoj, ŝultroj kaj noblaj kurboj de la skulptaĵoj. La frunto misformita, la buŝo flankentirita pro pasio, la esprimoj de infera doloro: ĉio fariĝis pli glata, simpla kaj kompreneblа.

Ankaŭ la soleco. Sur liaj manoj la elŝvelintaj vejnoj, lia viol-blueta haŭto.

Hororige iĝis prilumata la maljuneco.

La planko knaras.

Li ektremetis: Ĉu iu paŝadas?

— Kiu estas? — li ekkrias. — Ĉu estas vi? La morto?

Sur la stablo la pretiĝanta skulptaĵo kvazaŭ ekmovas sin.

Eble pli akraj formiĝis ĝiaj linioj ... Strange. Ĝis nun la silento ĉi tie ĉiam estis plena ĉe vesperiĝo. Nun ekstere melodie eksonas aŭtokorno.

— Ĉu estas sono de aŭtokorno?

Io donas respondon. Iu sonorigas, sonorigas, trifoje sonorigas kaj li vidas la batantan manon, kiu eksonigas la sonorilon, unufoje, dufoje, trifoje, oni perpugne batas ĝin; kunfandiĝas la sono en bela zumado, melodie alkroĉiĝante al la hupado ... tut ... tut ... tin tin ... tin tin ... tin tin.

Kaj subite li ekvidas tie supre la konturojn de malgranda, stranga homo sin premanta al la vitro de la alta fenestro. Mallarĝa korpo; lia manplato algluiĝas al la vitro, la frunto desegnas ovalon sur ĝi ... Knabo.

Knabo staras tie supre kaj gapadas en la luman atelieron.

Malgrasa knabo kun angulecaj ŝultroj. Sed li ne estas tiel malgranda; ja de la nivelo de la strato li atingas la fenestron, ĝis sia talio li vidiĝas tie supre. Eble estas adoleskanto.

Li enrigardas. Li gapadas internen. Kion li povas vidi de tie supre?

Maljunulon, kiu staras ĉi tie malsupre. Kaj skulptaĵojn. La rompitan seĝon apud la stablo de la pretiĝanta skulptaĵo. Tie li kutimas sidiĝi, kiam li laciĝas dum la laboro. Rapide li laciĝas.

La knabo vidas ankaŭ la grandan argil-trogon. Sur la griza argilo, ligna lato estas transverse ĵetita. Kaj li vidas ankaŭ grandan ĉerp-ŝovelilon.

La argilo estas kvazaŭ terbulo. Malmola, senkonsola terbulo. Neniam li scias, ĉu li ankoraŭ tuŝos ĝin, ĉu li modlos per ĝi, ĉu li ankoraŭ povas vivigi ion el siaj sonĝoj ...

La knabo ankoraŭ staras tie.

La skulptisto malrapide iras en la direkto al la ŝtuparo. Ĉu li kaptu lin ĉe la orelo? Ĉu li forpelu lin?

Aŭtuna, malseka mondo estas tie ekstere. Li tute ne rimarkis, ke pluvetas. La lumo de la akraj lanternoj trarompas la malhelon. Oni devus suprenetendi la manojn por estingi ĉiujn laŭvice.

— Ne, knabo, kion vi rigardas?

Li estas surprizita, ke lia alitempa krakanta, kolera voĉo, kun kiu li kutimas forpeli la gapadantajn bubojn, estas tiel paca.

— Mi nur rigardas. Skulptaĵoj estas tie malsupre.

La skulptisto frotas sian nazon. Li estas embarasita. Li mem ne komprenas sin.

— Nu, venu malsupren, rigardu ilin de pli proksime. En tiu direkto, nur iru tien ...

La knabo dubeme rigardas lin, ripete retrostrabas por vidi, ĉu malbona intenco flagras en la okuloj de la maljunulo. Poste li enpaŝas tra la pordo kaj malsupreniras, kien la elektra lumo montras la vojon.

— Kiel varme estas — li diras mallaŭte, haltante en la varmeto frapanta lin el la ateliero.

Lia paŝado fariĝas iom malcerta, poste li ekiras malrapide. Li klinas sin kaj longe observas la gipsajn kapojn kuŝantajn sur la planko. Li rektigas sin, atingas la mezon; avida interesiĝo briletas en lia rigardo; li ĉirkaŭiras la nudan figuron.

— Ĉu tiel vi tajlas ĝin el la argilo? Kiel vi scias, kia ĝi estos, kiam ... kiam vi trančas la argilon?

Ankaŭ la skulptisto paŝas al la pretiĝanta verko. Jam de tagoj, li ne metis manon sur ĝin, ĉar li opiniis, ke ĝi ne meritas la finofaron. Nun kvazaŭ ĝi estus tute alia.

— Nu, nur sidiĝu tie ... en la angulo. Sed ne moviĝu. De tie vi povas ĝin rigardi.

La modlilo iom tremetas en lia mano. Li klinas sin al la skulptaĵo, rigardas ĝin; tamen el la angulo de siaj okuloj li vidas la knabon.

Tiu ĉi sidiĝis nur sur la angulo de la ligna seĝo; etendis siajn krurojn antaŭen; liaj du manoj pugne tenas la du flankojn de la sidloko de la seĝo.

Liaj rondaj, malhelaj okuloj kun granda atento sekvas la vojon de la modlilo.

Kia maldika knabo. Li ne estas pli ol dektri-jara. Liaj okuloj tremetas de tempo al tempo. Sed kiel

strangajn bird-okulojn havas tiu knabeto... ankaŭ lia vizaĝo estas mallarĝa, longforma. Li havas iom fleksitan, maldikan nazon, larĝan, delikatan frunton. Sur la eta kranio de birdoj estas tiel fragil-osta la frunto.

Tiu estas birdo. „Ĝi" tiradas sian nazon. Nu, nu, eble „ĝi" ankaŭ ekpepos!

Li iomete ekridetas pro la penso. La knabo rapide ekparolas, ĉar instinkte li eksentis la mildiĝintan humoron de la maljunulo.

— Tiel malmulte vi forprenas... jes, ja, poste tiel malrapide... ĉu ne?

La rideto malaperas de la vizaĝo de la skulptisto. Li riproĉas lin.

— Ĉu mi ne diris, ke estu silenta?

La knabo palpebrumas, iom suprentiras siajn ŝultrojn; li estas en embaraso. Denove li etendas antaŭen sian kolon kaj atentas la malrapide moviĝantan, maljunan manon.

La skulptisto kaŝrigardas tien, vidas la brilan, naivan paron da okuloj ronde malfermita kaj urĝas sin je pli rapidaj movoj. Li preskaŭ ludadas per sia laboro kaj produktas miraklon antaŭ la okuloj. Elformiĝas la gracie transĵetita dekstra kruro de la nuda figuro; detavoliĝas la superflua argilo ankaŭ de la maldekstra kruro kuŝanta sur la piedestalo. Pli supre kreiĝas la delikatlinia ventro, liberiĝas la fajna linio de la akselo... poste la gracila kolo, virge mallarĝaj ŝultroj, la ronda kapo sub la turforme aranĝitaj harplektaĵoj.

Li iom ekĝemas kaj lasas malsupren sian manon. Li jam estas laca.

— Bonvolu diri... ĉu mi rajtas paroli?

— Eblas.

La knabo eksaltas, rapide kuras al la skulptaĵo, ĝisfunde ĉirkaŭrigardas ĝin kaj kun ekbrilantaj okuloj diras:

— Ja, vere... oĉjo, vi estas ege mirinda homo.

Ridas liaj okuloj, lia buŝo, eĉ liaj du brakoj, kiam li dise montras per ili.

— Sed, vere... kiel bone vi scias tion... Ĉu vi, oĉjo... ĉu vi lernis tion de iu? Aŭ ĉu nur de vi mem?

La skulptisto lavas siajn manojn ĉe la krano, jam kun sia dorso al la knabo.

— Mi lernis tion. Certe. Sed la lernado ne sufiĉas.

— Ho, ĉu vi kredas, ke mi ne scias tion? Ankaŭ talento estas bezonata. Tion oni ne povas lerni, oni devas naskiĝi kun ĝi kiel kun la violonludado... pli ĝuste kun la bona aŭdsenso por la muziko, ĉu ne?

— Ni supreniru. Nu, venu. Estas la fino de la laborlago.

Ekstere eksonas sonorilego. Estas la oka.



Prologo — skulptaĵo de Károly Kirchmayer

— Ĉu oni ne riproĉos vin hejme?

— Ne-e — mia avino ankoraŭ ne estas hejme. Ŝi estas en la kinejo. Vi scias, ŝi estas vestgardistino.

La knabo iras malantaŭ li sur la ŝtuparo. Li ĉirkaŭrigardas supre en la nuda, malgranda ĉambro; per kuntiritaj okuloj li gapas antaŭ la malheliĝinta oleopentraĵo; rapide li turnas sin kaj atendante li rigardas al la skulptisto.

— Sidiĝu. Ĉu vi ne malsatas?

— Ho, mi jam manĝis. Mia avino ĉiam antaŭpreparas la vespermanĝon.

— Ĉiuokaze, ne malutilus por knabeto kiel vi, jam enlitiĝi tiatempe — murmuras la skulptisto, sed li diras tion duonvoĉe, kvazaŭ li ne volus, ke la knabo aŭdu.

— Mi ne estas malgranda. Mi estos dekkvar-jara la sekvan monaton. Mi jam finis la okan klason de la elementa lernejo. Nun oni volas sendi min al metilernejo, sed mi — vere, vi scias, mi ne havas inklinon al tio.

— Priparolu tion kun via patro.

— Tio estus bone. Sed patro, vi scias, forkuris. Cetere, mi estas tute memstara, ĉar mi havas pension.

— Ĉu vi? Ne blagu.

— Sed oĉjo, je mia honor-vorto mi ne blagas. Mi estas pensiulo. Panjo mortis antaŭ tri jaroj kaj mi ricevas pension. Ĉar mia avino ne volis transdoni min al eduk-internulejo kaj ne havas sufiĉe da laborgajno, pro tio do, unuvorte, mi ricevas pension, sescent forintojn. Kiam mia avino fariĝos pensiulino, ŝi ricevos nur kvincent — li aldonis fiere ... Kaj Karĉjo, la frato de panjo perlaboras dumil ducent. Li estas mekanikisto. Patro ne agis bone, kiam li foriris, sed tio estas lia afero. Ni bone fartas ankaŭ sen li. Ni ĉiuj tri enspezas monon.

Li paŝas al la angulo, kie sur manplat-granda, bronza medaliono vidiĝas profilo de virina vizaĝo.

— Kaj ĉi tiu, kiu ŝi estas?

Estas malfacile por la skulptisto respondi; li sentas, ke estos sentimentala la vorto, kiu forlasos lian buŝon. Li faris la medalionon pri sia patrino, tamen li diras alion.

— Tiu estis maljunulino konata al mi. Antaŭlonge mi faris ĝin.

Li elprenas panon, faras tranĉaĵojn kaj ŝmiras buteron sur ilin. Li metas teleron en la mezon de la tablo, sidiĝas apud ĝi kaj geste vokas la knabon.

— Manĝu.

— Mi jam manĝis. Sed vere. Mi ne estas malsata.

— Nu, por ke mi ne manĝu sola.

La knabo enbuŝigas dikan mordaĵon; la postsignoj de liaj dentoj konturas duonrondon sur la pantranĉaĵo.

— Tio ĉi ja ne estas la unua fojo, ke mi estas ĉi tie. Hu, kiel mi ĉiam deziris paroli kun vi, oĉjo.

Li surpriziĝis.

— Ĉu kun mi?

— Je-es. Ĉar ... sed bonvolu ne priridi min: ankaŭ mi dezirus esti skulptisto.

Li mallevas sian manon, rigardas iom timante, poste siajn okulojn li forturnas de la maljunulo.

— Mi scias, ke estas malfacile ... sed mi ... vi scias, mi ĉiam desegnas, ekde mia infanaĝo ... kaj ... sed mi preferus la skulptaĵojn ... kion vi opinias?

Nun kion li diru al la ronde larĝiĝintaj, malhelaj bird-okuloj?

— Do ... oni devas rigardi, ĉu vi havas talenton. Kiel vi nomiĝas?

— László Bene.

Lia fingro pro lia ekscitiĝo glitas sur la buteron sur la pano kaj la tranĉaĵo tute kunpremiĝas.

— Nu, do mi rigardos, ĉu vi estas talenta. Ĉar nur por tiu valoras. Oni ja devas multe lerni, se oni volas esti artisto.

— Mi scias tion, mi legis biografion pri Botticelli. Ege multe oni devas labori ... en marmoro estas tre malfacile, sed kiu regas sian metion, tiu venkas ĉion, ĉu ne?

— Jes. Sed nun iru hejmen, mia filo. Ni ankoraŭ parolos pri tio.

— Mi iras. Mi do venos morgaŭ. Ĝis la revido.

Kaj li etendas sian manon. Liaj magraj, bruniĝintaj, maldikaj fingroj tie atendas en sia iomete suspektinda pureco, etenditaj al la skulptisto. Tiu ne povas fari alion; li prenas la manon en sian kaj eksentas, kiel arde varma ĝi estas. Ŝajnas, ke dum la tuta tempo la knabo flamis, flagris pro sia ekscitiĝo.

Supre brufermiĝis la pordo. Estiĝis silento.

Eĉ ne silento, sed malpleno.

Tie sur la angulo de la tablo kuŝis la ekmanĝita buterpano. Du akraj duonrondoj estis konturitaj en ĝi. Antaŭ la alia seĝo estas makulo de koto. Nu, rigardu, liaj ŝuoj, sekiĝinte, disfaligis la koton.

La maljuna skulptisto senvestiĝas malrapide. Li ridadas en si.

— Skulptisto! Stulta eta birdo kun siaj maldikaj kruroj, ostecaj ŝultretoj. La pensiulo!

Surprizite li rektigis sin: mallaŭte siblante, li komencis zumkanti malnovan melodion.

Li enŝovis sin sub la litkovrilon. Alitempe malfacile li povis ekdormi, longe li sentis malvarmon; ĝis li varmiĝis, ne venis al liaj okuloj la dormo. Nun li pensis pri la knabo, kaj li havis tian senton, ke la tuta eta homo estas tre ridinda.

Oni devas rideti pri li.

La ombro de la fenestrokrucaĵo ĵetiĝis sur la muron. La lumo ĉion figuris kiel la mano de naturalista artisto. Kaj kiel ĉielarko ĝi lumigis sur la angulo de la tablo la forgesitan buterpanon kun la du duonrondoj, kiujn la dentoj de la knabo entranĉis. Li ekdormis.

Tradukis Éva kaj Bernard Golden

János Pilinszky



DU PORTRETOJ

(AL MANJO KAJ JULĈJO)

JUVELO

En majstra peco, en spegul' ovala
rigardas sin la antilop'.
Sur ĝia kolo gem'.

Ni diras pri ĝi: belas murtapiŝe.
Ni diras al ĝi: nur rigardu vin,
ni dume naskos, akuŝiĝos, mortos.

Tiaspecaĵojn flustras ni al ĝi,
al antilop', vivanta en frenezo.

DISIPULOJ

Vin portis ne l' esper'. Sed la varmer',
grizanta modelpaste, poste blanka,
kaj fine nenia.

La krano en la lavoniĉ'
nek tage vin nek nokte dormi lasas.
Trablovas. Patro vin forgesis.
La knaboj rehejmiĝas.
Knabinoj — neniam.

ALKOHOLO

Mi aperigas la neeblon,
dom' staras sur ĝi kaj arbet',
mutege muta besto kaj
pantalongambo en krepuŝko.

FINALO

Mi mem stariĝos eble mezen.
Eble vesperas. Eble vesperiĝas.
Kio certas: estas malfrue.

BRONTË

Mesaĝas la koĉeroj: jen ni venos.
Kaj la gastontoj: ni alvenos.
Kaj la lanternoj en flugad'
trastrekas jen la spacon, korton,
la nokton kovras lumkovril',
juglanduj-trunkojn, la subjupon
de l' vinberujoj kaj la randon,
trempitan pluven-venten, de l' ŝtonplat'.

Ĉeestas ni.
Malfermu pordon.
Jen estas nia lasta nokt'.
La lastan fojon ni gastadas.

Tablumu do.
Litumu do.
Primetu la fornon.
Delasu la hundojn liberaj.

REMBRANDT

Gepatra dom': el cindro kaj vinagro.
Kis' kaj mankis': el cindro kaj vinagro.
Okuloj fermiĝintaj tombe, lite,
en disciplino, jam transmorta.

Tradukis Béla *Hules*

Ferenc Király

HUNGARA ĥORDIREKTISTINO EN „LA PERLO DE ANTILOJ"

En Havano, proksime al la Placo de Revolucio, ni trovas dometon, kiun oni nomas *„Casa obrera":* Laboristhejmo. Vespere en la domo aŭdiĝas hungaraj vortoj, hungara muziko: kubanoj „luktadas" kun la hungara lingvo, por ili — laŭdire — nelernebla. Sed la komuna lingvo, la muziko helpas ilin venki la komencajn barojn. Ĉar la muziko, la ĥorkantoj de Kodály kaj Bartók enhavas multon, kio povas kapti kaj pensigi ĉu fervojiston, ĉu tabaklaboriston, ĉu instruiston. Kaj la neforgeseblaj melodioj rapide enradikiĝas en la koroj, ĉar en la mondo vivas malmulte da popoloj tiel muzikemaj, kiel tiu de Kubo.

Ĉiun lundon kaj merkredon ĉi tie renkontiĝas la membroj de la Havana centra laborista ĥoro, atendante *„la directora hungara":* la hungaran kapelestrinon, Ágnes *Kralovszky,* kiu post geedziĝo nun havas la Kuban nomon: Inés *Gonzales Fuxa.* Ágnes akiris diplomon pri ĥordirektado en la Budapeŝta Muzikakademio en 1967. Ĉi tie ŝi konatiĝis kun Kuba studento, sekvis geedziĝo. Kaj de sep jaroj ili vivas en Kubo.

Ágnes iĝis konata kaj estimata en la lando, kaj ne nur en muzikistaj rondoj, sed ankaŭ en la cigarfabriko *„Corona",* ĉar antaŭ kelkaj jaroj en ĉi tiu fabriko ŝi fondis la unuan Havanan laboristĥoron.

— En Kubo estas pli ol centjara tradicio — diras Ágnes Kralovszky, jam katedrestrino de Havana Altlernejo pri Arto —, ke la tabaklaboristoj, tordante la tabakfoliojn, aŭskultas poemdeklamadon kaj muzikon. Mem la laboristoj elektas deklamanton el inter si, kiu ĉiutage laŭlegas unu-du horojn: romanojn, novelojn, krome ankaŭ dum ripozo ili kantas: popolkantojn, revoluciajn kantojn. Iun matenon mi aŭskultis la kantadon de la laboristoj de *„Corona":* poste mi multfoje vizitis ilin.

Tiel okazis, ke fondiĝis la cigarfabrika ĥoro. Post jaro ili gajnis en nacia festivalo kantante Kubajn laboristajn kantojn kaj „Dana dana" de Lajos *Bárdos.* La tuta fabriko ĝojis pro la sukceso, kaj baldaŭ la programo de tiu ĥoro fariĝis ĉefa programero de festoj sub direktado de Ágnes.

La famo pri la ĥoro alvenis al la landa sindikata centro, kiu petis la hungarinon, ke ŝi helpu fondi la centran Havanan laboristoĥoron. Ŝi dum monatoj vizitadis la fabrikojn, aŭskultante la volontulajn kantistajn grupojn, kaj elektis la plej taŭgan voĉmaterialon.

Tiel fondiĝis la ĥoro en la malnova laborista hejmo, prenante la nomon: *"Centra sindikata laborista ĥoro".* Ĝin partoprenas viroj kaj virinoj 16—58-jaraj. Ili kunvenas post laboro kaj konatiĝas kun la plej belaj kantoj de la Kuba laborista movado, kun verkoj de hungaraj komponistoj, kaj — ĉar la ĥoranoj plejparte ne lernis muzikon — ankaŭ kun la bazoj kaj metodo de kantado.

Antaŭ monatoj estis aranĝita en urbo *Matanzas* landa festivalo de Kubaj ĥoroj, kiun la supre menciita ĥoro ankoraŭ ne partoprenis; tamen la laboro de la hungarino senteblis: unue, ĉar la kapelestroj lernintaj de ŝi en la Altlernejo estis inspiritaj de la ŝato al la hungara muziko, kaj due, ĉar Ágnes *Kralovszky* en la lando ĉie konigis la hungaran muzikon. La rezulto estis, ke el inter la 26 ĥoroj partoprenintaj la festivalon, pli ol duono konkuris per hungaraj ĥorkantoj.

La hungarino trovis elstaran helpanton en la persono de Juan José *Fuxa,* direktoro de Muzika Altlernejo, kiu dum longa tempo estis ambasadoro de Kubo en Budapeŝto. Tie li ekkonis kaj ekŝatis la hungaran vivon, muzikon. Ili kune tradukis la verkon de Zoltán *Vásárhelyi* „Metodiko de ĥordirektado", el kiu lernas la Havanaj muzikstudentoj.

Tr. VHZS

Disvastiĝas la muzikpedagogio de Kodály

La direktoraro de la *Internacia Kodály-Societo* dum sia januara kunsido konstatis, ke dise en la mondo ĉiam pli da fakuloj — pedagogoj, muzikscienculoj kaj artistoj — interesiĝas pri la muzikinstruaj principoj de Zoltán Kodály. Tion montras ankaŭ la fakto, ke lastatempe oni fondis en pluraj landoj Kodály-institutojn kiuj aranĝas metod-kursojn por muzikinstruistoj. Tiamaniere estas ĉiam pli vaste aplikataj la principoj de Kodály en la muzik-instruo de la infanoj. Jam funkcias Kodály-institutoj en Aŭstrio, Francio, Italio, Japanio, Kanado kaj Usono.

La Internacia Kodály-Societo kunagordas la agadon de la institutoj, krome ĝi helpas tutmonde la muzik-fakulojn konatiĝi kun la principoj de Kodály. Ĝi disponigas al ili faklibrojn, bibliografiojn, informas la membrojn pri Kodály-seminarioj, organizotaj en diversaj landoj. Oni atendas pluan disvastigon de la Kodály-metodo pere de la Kodály-simpozioj, organizataj far la internacia societo en ĉiu dua jaro; ĉi-jare — jam la tria — okazos en *Kanado.* Ĝia vasta programo enhavas demonstradajn instruojn, koncertojn el verkoj de Kodály, krome rondtablaj diskutoj kaj primetodaj konsultadoj ebligos interŝanĝon de spertoj kaj opinioj.

* * *

En *Romo* okazis internacia scienca kunsido pri apliko de la Kodály-metodo en Italio. Partoprenis i. a. D. *Cieri,* prezidanto de la Roma Muzikinstruista Konsilantaro, A. *Mascagni,* direktorino de la Muzikinstituto de Trento, G. *Mangione,* direktoro de Muzik-instituto en Firenze, specialiĝinta por enkonduko de la Kodály-metodo. Prof. *Santucci,* reprezentanto de la Ministerio pri Kulturo promesis ŝtatan subvencion por la disvastigo de tiu metodo.

* * *

La Aŭstralia delegítaro de kant- kaj muzikinstruistoj studantaj la Hungarlandajn muzikinstruajn metodojn, konatiĝis kun tiuj en la Muzikpedagogia Instituto de *Kecskemét,* naskiĝurbo de Zoltán Kodály.

Komp. I. *László*

Hungaraj muzikistoj en la tuta mondo

II.

En la unua parto de mia raporto mi klopodis montri, ke en multaj partoj de la mondo troviĝas hungaraj aŭ hungardevenaj kapelestroj kaj pianistoj, kiuj fariĝis mondfamaj artistoj.

Nun, daŭrigante la raporton, mi parolos kelkajn vortojn pri violonistoj, violonĉelistoj, ĉambromuzikensembloj kaj kantistoj hungaraj, — vivantaj en diversaj landoj.

Inter violonistoj unue mi mencias la nomojn de Adila kaj Jelly *Arányi.* Ambaŭ fratinoj vivas en Londono la unua konata sub la nomo Adila *Facchiri,* — al la dua Béla *Bartók* dediĉis siajn du violonsonatojn. Ambaŭ fratinoj estas bone konataj virtuozoj.

Eliz *Cserfalvy* estis premiito de la internacia muzika konkurso en Ĝenevo en la jaro 1946. Post edziniĝo ŝi rolas en koncertoj sub la nomo Elise *Gerecz. Árpád Gerecz,* ŝia edzo estas same muzikisto, violonisto, kaj rolas ankaŭ kiel kapelestro en Ĝenevo.

Endre *Gertler* vivas en Bruselo, kie li estas profesoro de la violonludado. Li estas sindona propagandisto de la nuntempa muziko. Ofte li prezentas verkojn de *Bartók.* La violonkonĉerto de Alban *Berg* estas dediĉita al li.

Zoltán *Székely* ofte ludis en koncertoj kune kun Béla *Bartók.* Li transskribis la fortepianoverkon „Rumanaj dancoj" de Bartók por violono, kun la konsento de la komponisto. Li vivas en Nederlando.

József *Szigeti* estis unu el la plej elstaraj violonistoj de sia epoko. Li apartenis al la amika rondo de *Bartók,* en Ameriko (Usono); ili ofte ludis en koncertoj kune. Li mortis antaŭ kvar jaroj.

Estas multe pli da hungardevenaj violonistoj en la mondo, sed ilia listo prenus tro multe da loko; pro tio ni nun aliras al la *violonĉelistoj,* atestante ke ankaŭ inter ili troviĝas multaj hungaroj.

Judit *Bokor* vivas en Nederlando. Antaŭ kelke da tempo ŝi ofte rolis en koncertoj, nun ŝi retiriĝis.

Tibor *Machula* estis disĉiplo de Adolf *Schiffer* kaj ludis ofte en koncertoj; li estas soloisto de la nederlanda *Concertgebouw-Orchester.*

János *Starker,* ankaŭ disĉiplo de Schiffer kaj de Leo *Weiner,* premiito de la internacia muzika konkurso en Ĝenevo en la jaro 1946, estas menciata inter fakuloj kiel unu el la plej grandaj violonĉelistoj de la mondo.

El la grupo de hungaraj violonĉelistoj kaj violonistoj troviĝas kelkaj, kiuj fondis *ĉambromuzikensemblojn,* konatajn en la tuta mondo. Inter ili estas inde mencii *New Léner Quartett,* kiu formiĝis el hungaraj muzikistoj post la morto de Jenő *Léner,* la fondito de la originala unua Léner-kvarteto.

La *Hungara kvarteto* rolas sub gvido de Zoltán Székely. La *Végh-kvarteton* fondis Sándor *Végh,* ĝi fariĝis mondfama ensemblo de hungardevenaj artistoj.

Multaj *kantistoj* mondfamaj estas hungaraj aŭ hungardevenaj. Unue estas menciinda Gitta *Alpár,* komence ano de la Budapeŝta Operejo, poste de la Berlina Ŝtata Operejo; nun ŝi vivas en *Hollywood.*

Multloke konata estas la nomo de Rosette (Piroska) *Anday,* kiu estis kaj restis ano de la Viena Ŝtata Operejo. Precipe en roloj de Carmen kaj Aida ŝi akiris mondfamon.

Gábor *Carelli,* hungara kantisto iĝis fama tenoristo de la Operejo *Metropolitan* en Novjorko; ankaŭ liaj patrianoj aŭdas lin ofte en la Budapeŝta Operejo.

Marta *Eggerth* kune kun sia edzo, la pola operkantisto Jan Kiepura, akiris mondan famon en operetoj kaj filmoj, fabrikitaj post Eŭropo ankaŭ en Usono.

Dezső *Ernster* apartenas al la plej konataj kaj altnivelaj basistoj de la mondo. Ekde 12 jaroj li estas ano de la Operejo Metropolitan, sed rolas ofte en Hungario.

Anna *Gyenge* kantas sub la nomo Anna *Roselle* en la Operejo Metropolitan en Novjorko. Ŝi estas plej konata en la operoj de Puccini. Ŝi laboras ankaŭ kiel kant-pedagogo.

Maria *Ivogrűn* estis kantistino de la Urba Operejo de Berlino; krom tio ŝi estis profesoro de la Muzika Akademio de Berlino. Nun ŝi retiriĝis de la publika kantado.

Sándor *Kónya* estis tenoristo en Berlino. Poste vojaĝis tra la tuta mondo, kaj fariĝis ĉie konata eminenta kantisto. Li rolis ofte en la Operejo Metropolitan, ankaŭ dum la Wagner-Festoludoj en *Bayreuth.*

La iama Budapeŝta baskantisto, Endre *Koréh* ofte rolis en Novjorko (Operejo Metropolitan) kaj estis ano de la Viena Ŝtata Operejo. Multaj fonodiskoj donas impresojn pri lia arto.

Jen kelkaj nomoj el inter la mondfamaj hungaraj muzikartistoj. La liston ampleksigus, se ni mencius famajn ludantojn sur kromaj instrumentoj (ekz. aldviolono k. a.). Mankas listigo de famaj artistoj, vivantaj en Hungario (Annie *Fischer* pianisto, Pál *Lukács* aldviolonisto, Sándor *Svéd* kantisto k. a.).

Fine estas necese akcenti, ke ne sufiĉas laŭdi la grandajn kaj famajn muzik-talentulojn — estas grava ankaŭ la merito de la hungaraj muzikpedagogoj, kiuj ne nur serĉas—trovas la estontajn famajn muzikistojn, sed edukas ilin, ĝis ili fariĝas bonegaj kaj konsciaj artistoj, riĉigantaj la ĝeneralan homan kulturon.

Lajos *Lesznai*



Portreto

Lerneja fakrondo

panoramo

Depost dek jaroj ekzistas en Hungario la sistemo, ke la salajritaj virinoj, kiuj prizorgas hejme sian infanon — ĝis la tria jaro — ricevas de la ŝtato konsiderindan, monatan patrinecan monhelpon. En pasinta jardeko unu miliono da patrinoj kaptis tiun eblecon: laboristinoj kaj instruistinoj, oficistoj kaj kuracistinoj lasis do la profesian laboron, kaj restis hejme por varti siajn bebojn. Tiu sistemo montriĝis vere sukcesa, ja la nombro de la naskiĝoj antaŭe tre malgrandiĝis. Minacis „maljuniĝo" de la loĝantaro, la novaj generacioj malpliiĝis. Kune kun aliaj subvencioj kaj favoroj porinfanaj (i. a. nasko-subvencio 2500 Ft-a) la demografia deklivo finiĝis: la naskonombro je mil loĝantoj — en 1966 nur 11 novnaskitoj — altiĝis en 1976 jam al 18. Por la etuloj la tuttaga patrina prizorgo kompreneble donas la plej grandan utilon kaj ĝojon.

* * *

Multaj patrinoj, kiuj ne intencas resti hejme, ĉar volas plu praktiki sian profesion post la nasko, dumtage konfidas la bebojn al *suĉinfan-vartejoj*. La 3-jarajn etulojn atendas daŭre kreskanta aro da tuttagaj *infanvartejoj*, ĉar post ĉeso de la „patrineca monhelpo" la plimulto de la patrinoj reprenas sian profesian laboron. La vartejoj estas moderne ekipitaj, abundas ludiloj; la edukistinoj finis altlernejon por plej bone zorgi pri la geknaboj. En la antaŭlerneja jaro la infanoj komencas konatiĝi kun la lernejaj farendaĵoj. La kotizo estas malalta, kaj dependas de la familia enspezo.

* * *

La deviga lernado en Hungarlando daŭras de la 6-a jaro ĝis la 16-a, kaj baziĝas sur la elementa lernejo (8-klasa). Ĝin sekvas laŭvole gimnazio, faka mezlernejo aŭ faklernejo. Ĉiu estas tute senpaga, same — laŭ gepatra deziro, bezono — la partopreno en la posttagmezaj studrondoj sub kontrolo de instruistoj. Malmultekostaj tagmanĝo kaj lunĉo estas al dispono de la lernantoj en la lernejo, favore al la gepatroj.

* * *

Oni devas aparte zorgi pri la paroldifekton havantaj infanoj, korekti ilian parolkapablon por rekonduki ilin al la klasoj de la ceteraj infanoj. Tion plenumas sistema, tn. *logopedia edukado*, en apartaj institutoj, laŭbezone en apartaj klasoj, kie specialistoj okupiĝas kun tiuj infanoj.

* * *

Terapian pedagogion bezonas la korpe difektitaj kaj kriplaj infanoj: 35 mil tiaj bedaŭrindaj geknaboj estas edukataj por igi ilin laŭeble plej sanaj kaj laborkapablaj. Oni edukas — ofte en iamaj kasteloj — infanojn kun misaj membroj, aliloke tiujn kun mensaj difektoj; en urbo Vác funkcias lernejo por 300 surdaj kaj 100 duonsurdaj infanoj ktp. Ĉi-jare oni ampleksigas la institutojn per 2200 litoj.

* * *

Sana kaj hardita junularo devas scii naĝi! Por realigi tion, pli kaj pli da naĝejoj estas konstruataj ĉe lernejoj, ankaŭ per helpo de loĝantaro, de sindikatanoj, de fabrikoj. Jam la 5—6 jaraj etuloj laŭmetode ricevas instruadon pri ĉiuj naĝmanieroj, kaj regule praktikas ilin ankaŭ dum la deviga lerneja gimnastik-horoj. Post kelkaj jaroj da ekzerco, la plej kapablaj ricevas specialan trejnadon kaj partoprenos seriozajn naĝ-konkursojn.

panoramo

Gravajn sociajn kaj kulturajn zorgojn prezentas la tradicia situacio sur parto de la Granda Ebenaĵo: 800 mil homoj loĝas en ege dislokitaj bienetoj, resp. kamparanaj domoj, malproksime de vilaĝoj, sed proksime al la kulturendaj kampoj. La forajn lernejojn la infanoj nur pene atingas, precipe en malbona vetero; multaj el ili ĉesas lerni kaj ne finas eĉ la devigajn 8 klasojn. Por eviti tiun misajon, oni strebas kolekti ilin en kolegioj de regionaj centroj. Ne estis ĉiam facile konvinki la gepatrojn pri avantaĝoj de tia speciala kolegio, kiu samtempe edukas iliajn idojn pri moderna vivmaniero, krom la instruista helpo koncerne la studobjektojn. Jus ekfunkciis en vilaĝo Lajosmizse trietaĝa, plaĉa kolegio tiucele, por 300 lernantoj; entute jam pli ol 10 mil geknaboj loĝas kaj lernas semajne po 6 tagojn en tiaj kolegioj.

* * *

Sur la montaro de *Buda* tra arbaroj kaj valoj, tuneloj kaj viaduktoj kondukas la 11 km longa, etŝpura *Pionirfervojo*. Ĝi veturigas precize laŭ horaro amason da ekskursantoj kaj infanoj, kvankam preskaŭ ĉiun fervojistan kaj poŝtistan taskon plenumas 10—14 jaraj uniformitaj jun-fervojistoj, elektitaj el eminentaj lernantoj. Pro la eduka valoro oni jam instalis en nia lando plurajn similajn, kvankam pli mallongajn; nun ekfunkciis simila, 12 km longa, etŝpura Pionirfervojo en la montaro *Börzsöny* (ĉe la Danubkurbo). Ambaŭ fervojoj apartenas cetere al la fervoja reto de la Hungaraj Ŝtatfervojoj, kies regularo validas ankaŭ tie.

* * *

Dum la somera ferio granda amaso da lernantoj somerumas en tendaroj kaj specialaj infan-ripozejoj — inter montoj, apud riveroj kaj lagoj. Apud Balatono en *Zánka* troviĝas la plej granda „pionir-urbo" por plurmil somerumantoj — ĝi havas eĉ proprajn fervorstacion kaj ŝiphavenon. Kaj tie, kaj en la multaj sindikataj infantendaroj ĉirkaŭ Balatono, pedagogoj zorgas pri la junuloj. Simile ĉe la *lago Velencei*, kie nun konstruata ripozejo akceptos samtempe 5 mil junulojn. Proksime, ĉe *Agárd* nove ekipita bazo de akvosportoj (precipe perboataj) ebligas vastan sportadon, trejnadon de konkursantoj.

* * *

Lernantoj de mezlernejoj kaj de metioj, studentoj de altlernejoj dumsomere laŭvole entreprenas ankaŭ *salajritan laboron* en tiucele organizitaj provincaj tendaroj. Dum sinsekvaj (2—3 semajnaj) periodoj la tendaranoj grave helpas konstru-laboron ĉe digoj, kanaloj aŭ ŝoseoj, rikoltadon sur la kampoj aŭ en frukt-arbaroj, kompreneble dum reduktitaj laborhoroj. Por la bone provizata junularo restas abunda tempo por distri sin per propraj aŭ alvokitaj prezentantoj, por ekskursi kaj konkursi en sportoj, eĉ sin prepari por ekzamenoj kaj danci. Kiuj lernas *profesion* en specialaj fakoj, utiligas la someran ferion plejparte per praktika laboro en sia fako: entreprenoj, fabrikoj, resp. hospitaloj atendas ilin. Estontaj pedagogoj zorgas pri lernantoj en la supre menciitaj feriejoj, tendaroj. Ĝenerale estas dezirata unumonata somera praktikado (flanke de la alternejo k. s.); krom fakaj sportoj ili akiras ankaŭ konvenan salajron.

E. F.



En la klasĉambro

Fotoj de János Eifert

Junaj kantistoj en lernejo

REVUO DE REVUOJ

Komunikado bezonas Esperanton — deklaras anglalingve sur la titolbildo ESPERANTO NEWS, n-ro 1976/6. Gazetara Servo de Aŭstria Esperanto-Movado heroldas, ke kun permeso de la oficiala WIENER ZEITUNG kaj de la aŭtoro, prof. *Helmar Frank* (Paderborn) oni represis en ESPERANTO—AKTUELL 4—1976. lian artikolon, kiu aperis sub titolo „Speak you please my English?" okaze de *Scienca semajno* en Klagenfurt. La saman artikolon oni ankaŭ uzas por propaganda dissendo! Organo de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, LA SOCIALISTO (dec. 1976.) publikas artikolon titolitan „Kiu pagu por lingvoj en UN?" La faktoj meritas atenton: „UN devas pagi la kostojn por la *araba* lingvo ekde la jaro 1977. Kiam la Ĝenerala Asembleo de UN aldonis la araban lingvon al siaj oficialaj kaj laboraj lingvoj en 1973, la arabe-parolantaj ŝtatoj konsentis kovri la tutan koston por la unuaj tri jaroj, ĝis la fino de 1976. Post tiu limdato la kostoj devas esti pagitaj el la ordinara buĝeto. La 100 oficistoj laborantaj por la araba lingvo estos salajrataj el la kaso de UN. Jam ekde la komenco de la ekzisto de UN, la kostojn de la 5 oficialaj lingvoj: angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa, pagas UN mem. En 1975 enkondukiĝis la germana lingvo por ĉefaj dokumentoj de UN. La konsekvencajn kostojn kovras tri germanlingvaj ŝtatoj: Aŭstrio, FRG kaj GDR" — konstatas La Socialisto, kaj daŭrigas jene: „Okaze de la decido fare de la Ĝenerala Asembleo pri la germana lingvo la japana delegacio esprimis, ke ĝi „rezervas la rajton peti la saman konsideron por la japana lingvo kiel por la germana lingvo en la estonteco, kaj sub la samaj financaj kaj administraj kondiĉoj", dirante, ke „la principo de pago fare de uzanto (de lingvo) por ĉiuj rektaj kaj malrektaj kostoj devus esti strikte aplikata al ĉiuj lingvoj, surbaze de justa kaj egala traktado de ĉiuj lingvoj."

La vicdekano de Sciencuniversitato ELTE: Mihály Péter akceptas la estraron de ILEI en januaro de 1977

La monon de UN konsumas do plue la pliiĝantaj kostoj pro manko de interlingvo, en tempo kiam la subevoluintaj popoltavoloj forte bezonas kreskantan materialan helpon, precipe de siaj iamaj koloniigintoj. PACO komunikas (1976/5.) prognozojn pri la loĝantaro de la Tero en 2000; laŭ demografia studo de UN-sekretariato la plej granda kresko okazos en Sud-Azio, kie jam nun loĝas ĉ. triono el la 4 miliardoj de la nuntempa homaro. Ĝis la fino de nia jarcento grave kreskos ankaŭ Latin-Ameriko — de 246 al 652 milionoj —, kaj Afriko — de 303 al 818 milionoj. Tiu ritmo — meza jara nombrokresko: 2% — eble jam ne ripetiĝos en la estonteco, konstatas PACO.

Pri historio de la interlingvoj uzitaj en diplomatio skribis C. kaj A. *Gacond* en SAT-AMIKARO (junio 1976.): de la Vestfalia Kongreso, kiu finis la 30-jaran militon (1648) — kiam *latina* lingvo funkciis kiel parolata interlingvo — sekvis *franclingva* diplomatia epoko ĝis la fondo de UN. En la 70-aj jaroj aperas novaj pretendoj en UN: krom ĝiaj originalaj oficialaj (inter-) lingvoj: angla, ĉina, franca, hispana, rusa, uzi ankaŭ la *araban*, kaj lastjare ankaŭ la *germanan*. Ĉu ne sekvos pli novaj, simile justaj pretendoj? Ĉu ne estas tro multaj la jam sep „interlingvoj", — kaj ĉefe la novaj dolarmiliardoj, kiuj ja elspeziĝas (el nia propra poŝo!) ne por ĉesigo, sed por grandigo de la lingva ĥaoso?!

EHO, dana E-organo (febr. 1977.) citas el bulteno de la soveta scienca akademio: 127 lingvoj troviĝas nuntempe en Sovetio! Krom la tri slavaj (rusa, ukraina, blankrusa) la ceteraj 124 ne estas parencaj al la rusa. Ĉirkaŭ 70 el ili estas praktikataj en instruado, radio- kaj tv-programoj, havas libro- kaj gazet-eldonadon.

Pri *Lenin kaj Esperanto* aperigis artikolon LA PAC-AKTIVULO, kiun represis LA VERDA KOLOMBO (nov. 1976), organo de la Japana Pacdefenda E-Asocio. La aŭtoro, jus forpasinta konata hungara veterano Paŭlo BALKÁNYI, citas asertojn de Lenin: „La lingvo estas la plej grava rimedo en la rilatoj inter la homoj... Neniu nacio, neniu lingvo havu privilegion. Eĉ ne la plej etan ĝenon, la plej malgrandan maljuston kontraŭ la naciaj minoritatoj: jen la bazo de la laborista demokratio. La proletaro donas ĉiun helpon por detrui la diferencojn, la barikadojn inter la nacioj."

„*Unu el la plej bonaj informaj paŝoj*, faritaj en la ĝisnuna historio de la E-movado" instigis la revuon ESPERANTO (febr. 1977.) pruntepreni intervjuon de la soveta lingvisto d-ro Mahomet Izmajlović *Isajev:* „La diferenco inter »ludi rolon« kaj »esti«. La ampleksa artikolo unue aperis en SOVETA UNIO, 60-paĝa ilustrita kolora magazino, *eldonita en 19 lingvoj en plurmilionoj da ekzempleroj.* „Se oni ne turnus sin al la helpa lingvo... malfacilaĵoj daŭre kreskos. Ja la nombro de la lingvoj, kiuj aperas sur la internacia areno, pligrandiĝas — al vivo vekiĝas novaj kaj novaj popoloj, subpremitaj en la pasinteco" — respondis finfare d-ro Isajev al la intervjuisto A. Ĥarkovski.

La *Esperanto-redakcion* de *Pola Ra*dio atingis pasintjare 5777 korespondaĵoj flanke de aŭskultantoj — heroldas PILO-PRESS (3/1977) — per duonmilo *pli* ol en 1975. Je pinto de la jara statistiko troviĝas jenaj dek landoj: Sovetunio 1275, GDR 1065, Ĉehoslovakio 765, FRG 604, Hungario 462, Francio 438, Britio 419, Finnlando 191, Nederlando 191, Italio 80. Tre gratulinda kreskado!

Mária Rózsa *Szabó*

Uzbekistana esperantisto faris preleg-vojagon en Hungario

Petro Polišĉuk, la konata samideano el *Taŝkento*, ĉefurbo de la Uzbeka SSR, komence de ĉi jaro reciprokis la viziton de 50 hungaraj esperantistoj okazinta en 1967 en Uzbekio. La tiaman E-renkonton kunvokis la Uzbeka Ligo pri Amikecaj Rilatoj, kaj la ĉ. 140 diversnaciaj esperantistoj konatiĝis kun la vivo de tiu Mez-Azia respubliko, kun ties admirindaj mezepokaj monumentoj, ĝuis la gastamon de la registaro dum 9 tagoj. La famega *Samarkand* kaj kamparanaj vilaĝoj, sovĥozoj kaj kolĥozoj, fabrikoj kaj kulturpalacoj plen-amike akceptis la verdstelan karavanon; la ŝatata ĉefa organizinto nun fine akceptis la inviton de hungaroj.

Dum unu monato s-ano Polišĉuk senlace partoprenis la hungaran movadon: la Vintran E-Ferion en la ĉefurbo, karnavalajn vesperojn en buntaj vilaĝoj, klubkunvenojn kaj festenojn — kie li parolis pri la moderna vivo de la Uzbeka lando, prezentis la gigantajn ŝanĝojn post la emira-feŭda reĝimo (renversita antaŭ duonjarcento ankaŭ kun helpo de hungardevenaj ruĝ-armeanoj). Malaperis la 98%-a analfabetismo, la virin-vualoj; krom reto de altlernejoj ankaŭ la multaj (pliparte koloraj) televido-stancioj kaj ties abundaj programoj, *diverslingvaj* radioelsendoj kaj revuoeldonoj okulfrape manifestas tion.

Uzbeka lingvo servas kiel oficiala lingvo de la respubliko, deviga en la lernejoj kaj oficejoj, sed samtempe la multaj naciaj minoritatoj havas la rajton utiligi sian lingvon, kaj en siaj lernejoj, kaj en la vasta sfero de kulturo, dum legado de eldonaĵoj, dum aŭskulto aŭ rigardo de teatraĵoj, filmoj, programoj. Ĉiujare multaj lernas, partoprenas klub-amuzadojn, korespondas, resp. interkontaktas per amatoraj radio-sendiloj multajn eksterlandanojn, kiuj ĝenerale deziras scii multon pri tiu interesa lando, ties vivmaniero kaj tradicia kulturo, traplektitaj de la mahometana-araba influo kaj nun de la plej moderna tekniko.

— *Nur esperantisto* povas interrilatiĝi tiom profunde kaj vaste, kun ĉiuj soci-tavoloj de alia lando, kiel mi kapablis en via lando — adiaŭis s-ano *Polišĉuk* post monatlonga restado —. La spertojn de la fervoraj hungaraj amikoj pri disvastigo de nia lingvo mi hejmenportos kaj espereble nia uzbeklanda movado fruktodone utiligos ilin.

E. Fenyvesi

Estrar-elekta jarkunveno de Hungara Esperanto-Asocio

Novaj honoraj prezidantoj: lingvistoj d-ro János Balázs kaj d-ro László Deme, — meritplenaj movadanoj: Lajos Kökény kaj d-ro József Mátéffy.

Post paso de la kvarjara agadperiodo de la ĝisnuna komitato kaj prezidantaro, la 26—27-an de marto okazis la jarkunveno de HEA por elekti novan komitaton kaj prezidantaron, kiu gvidos la E-movadon dum la sekvaj kvar jaroj. Tiun ĝeneralan kunvenon de komitatanoj, delegitoj kaj invititoj partoprenis reprezentantoj de bulgara, ĉehslovaka, demokratia-germana kaj pola E-movadoj, kies gvidantoj transdonis amikajn salutojn de asocioj de sia patrio. Aperis kaj alparolis András *Rátki*, kunlaboranto de la scienca kaj kultura sekcio de la Centra Komitato de H. Socialisma Laborista Partio, — vicprezidanto de Packonsilio István Terényi, — la konata astronomo Aurel *Ponori—Thewrewk*, reprezentanta la gvidantaron de Sciencpopulariga Asocio (TIT), — Árpád *Szvoboda*, kunlaboranto de la Pionira Federacio. Estis reprezentitaj ankaŭ la C. Kom. de Junulara Komunista Federacio kaj Instituto de Kulturaj Internaciaj Kontaktoj. Ni emfazas alparolon de János *Vas*, sekr. de Landa Konsilio de Sindikatoj (SZOT). Granda atento kaj aplaŭdo atestis la ĝeneralan interesiĝon.

Post la salutparoloj la kunsido pridiskutis la ĝisnunajn rezultojn kaj la sekvantajn taskojn en la movado. Sekvis la elektadoj de la anoj de 75-membra landa komitato, kiu elektis el si mem la 19-membran prezidantaron. Estis elektitaj honoraj membroj de la Asocio: d-ro János *Balázs*, lingvisto-katedresto de Budapeŝta universitato *Eötvös Loránd* (ELTE), — d-ro László *Deme* lingvisto-katedresto de universitato de Szeged, — profesoro Lajos *Kökény*, redaktorinto de pluraj E-gazetoj, lernolibroj kaj d-ro József *Mátéffy* pensionita prez. de la Supera Tribunalo, ambaŭ pli ol duonjarcenton laborintoj por E sur terenoj de movado, literaturo, instruado, kaj kiel membroj de la Ekzamena Komitato.

Nova prezidanto de HEA estas d-ro Ferenc *Nezvál*, pens. justec-ministro, parlamenta deputito, — vicprezidantoj: Endre *Barát* dipl. profesoro de E, unua sekretario de Vác-provinca distrikto, parlamenta deputito, — d-ro Imre *Pethes*, sekciestro en Ĉefdirektoraro de Hungaraj Ŝtataj Fervojoj (MÁV), — Jenő *Molnár*, pens. fabrikdirektoro, — ĝenerala sekretario (denove) Imre *Kutas* pens. ambasadaro, — afergvida sekretario Tibor *Vaskó*, dipl. E-profesoro.

Post la ĝenerala kunsido, János *Vas* aranĝis akceptojn por honoro de la eksterlandaj gastoj kaj de la novaj oficistoj de HEA.

Tr.: A. P.

KOMUNIKAĴO

de la deka Konsultigo de Esperanto-organizajoj de Eŭropaj socialismaj landoj

En la tagoj de la 10-a ĝis la 13-a marto 1977 en Karl-Marx-Stadt (GDR) okazis la 10. Konsultiĝo de Esperantoorganizajoj el la jenaj landoj: Bulgario, ČSSR, GDR, Hungario, Polio Sovetunio.

La konsultiĝo pridiskutis demandojn kaj problemojn de daŭra kunlaboro de la reprezentitaj organizaĵoj. La partoprenintoj de la konsultiĝo substrekis la signifon de la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio, informis pri entreprenataj ĉi-koncernaj iniciatoj kaj priparolis multflankan kunlaboron lige kun ĉi tiu granda datreveno.

Specialan atenton oni turnis ankaŭ al analizo de la atingoj kaj farendaj taskoj en la porpaca agado de la esperantistoj, lige kun la antaŭstaranta Monda Asembleo de Packonstruantoj en Varsovio (majo 1977).

Oni pridiskutis formojn de la praktika kunlaboro en sferoj de scienco (inkluzive interlingvistikon kulturon, turismon, reciprokan informadon, krome ankaŭ kunlaboron kun UEA en ĉi tiuj sferoj. La konsultiĝon partoprenis ankaŭ gvidantoj de la junularaj sekcioj de la reprezentitaj organizaĵoj.

Estis formulitaj rekomendoj por praktika kunagado.

Oni decidis pri la preparo kaj organizo de la 11. Konsultiĝo.

La Konsultiĝo esprimis specialajn dankvortojn al la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, kiu amike gastigis la delegaciojn.

Karl-Marx-Stadt, la 13-an de marto 1977.

Multflankaj klopodoj por evoluigo kaj protektado de Balatono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

D-ro Ferenc László

Unu el niaj plej grandaj naciaj trezoroj — Balatono estas la plej ampleksa kaj nun ankoraŭ plej pura lago de Mez-Eŭropo. Ĉe meza akvonivelo ĝia surfaco estas 600 km²-a. La akvo de lago, situanta en pentrinda ĉirkaŭaĵo, estas altkvalite oportuna por sinbanado kaj prezentas grandajn eblecojn por ŝatantoj de akvaj sportoj. Jam ankaŭ la rigardado de la lago donas refreŝiĝon al la homo deziranta malstreĉitecon. La harmonion, lirike inspiritan belecon de konekso inter lago kaj pejzaĝo ofte prikantis, priskribis niaj poetoj, verkistoj.

Kiom ajn primara karaktero de Balatono estas, ke ĝi estas *lago*, tamen ĉiu sentas en tiu nocio, ke al ĝi apartenas ne sole lago, ĝiaj bordoj, sed ankaŭ la apuda regiono.

Du naturdonitaj faktoroj: la precipitaĵoj kaj vaporiĝoj — kaj du aliaj faktoroj reguligeblaj ankaŭ per homa ago: la enfluo kaj elfluo faras alterne alta la nivelon de la lago. Koncerne Balatonon nuntempe nur la elfluo estas reguligebla, la problemo de la akvonivelon altigantaj alfluoj ankoraŭ estas ekzamenata. Ĉar la bordoj havas milde leviĝantajn deklivojn, kune kun la ŝanĝiĝo de la akvonivelo aliiĝas ankaŭ la akvoteritorio kaj la bordoteritorio, krome tiujn ŝanĝas ankaŭ la sistema altigo de la akvokuŝejo farata por akiri terenon necesan por konstruadoj. La borda tereno, respektive la akvonivelo devas do esti tia, ke la fona parto de la bordo estu plene sekurita de inundo, t. e., ke la bordaj teritorioj estu ekster la terenoj de la bordo atingeblaj per fluso kaj ondoj. Por uzado de la bordo, por iu ajna utiligo de la lago kaj por tiucelaj instalajoj, konstruaĵoj estas bezonataj eĉ pli grandaj bordoteritorioj. Kiel praktika minimumo formiĝis la refreŝigeja bordostrio 1—2 km-jn larĝa, kiu ebligas atingi la ĉef-straton, resp. ĉefan fervojlinion sur kiuj oni veturas al la lagaj ripozejoj. Apud la refreŝigeja bordostrio estas la administreja tereno de la komunumo, al kiu la banejo apartenas, kaj tio grandigas la bordoteritorion.

Plu kreskigas la Balaton-regionon la proksimaj ekskursejoj kaj kuracbanejoj, krome tiuj vilaĝoj, kie la vivo kaj laboro de la loĝantaro strikte kunliĝiĝas kun la lago.

Ankaŭ naturdonitaj cirkonstancoj postulas grandigon de ĉi tiu teritorio: por ŝirmi la rigardeblecon, panoramon *el la lago* kaj *al la lago*, almenaŭ ĝis la unuaj akvodividaj montoj, montetoj. Sur la teritorio-strio inter tiuj akvodividejoj kaj la bordlinio estas necesa la plej severa region-protektado, unuavice malpermeso de arbar-ekstermado kaj la minado. Laŭ vidpunktoj de la akvomastrumado kaj biologia ŝirmado de la lago, la tuta akvokolekta teritorio de la lago plej strikte ligiĝas al ĝi. Ĉiu ŝanĝiĝo de kvanto kaj kvalito de la akvo sur la akvokolekta tereno efikas iel sur la vivspacon de la lago. Baza kondiĉo de ĉiu refreŝiĝo, fremdultrafiko, sed ĝenerale de la vivo ĉirkaŭ Balatono estas la nedifektiĝo de laga medio.

La naturdonitaj faktoroj estas la plej ĉefaj elementoj de la Balatona pejzaĝo.

Tiu pejzaĝo havas tre agrablan klimaton. La lago situas ĉe renkontiĝo de tri ĉefaj klimato-teritorioj: oceana, mediteranea kaj kontinenta. Tiuj alterne povas regadi, kaj tio faras tre varia ĝian klimaton; tamen tiu varieco samkaŭze protektas la Balatonregionon kontraŭ superrego de pli malfavoraj oceanaj, resp. kontinentaj klimatoj. Ĝian klimaton krome influas ankaŭ lokaj efikoj: la rilate pli altaj montoj post la norda bordo protektas ĝin kontraŭ la nordaj, nord-okcidentaj, — pli malofte — kontraŭ nord-orientaj ventoj, — samokaze la deklivoj de tiuj montoj, rigardantaj al la lago, akceptas en pli granda incida angulo la sunradion kaj tial pli forte varmiĝas. Plu varmigas la deklivojn la sekundara sunradiado, reflektiĝanta de sur la grandega akvospegulo de la lago, kaj tiel formiĝas pli agrabla klimato, simila al la Riviera.

Laŭ vidpunkto de refreŝigo estas tre favoraj la orografiaj (tersurfacaj) cirkonstancoj de ĉirkaŭlagaj pejzaĝoj. Sur la norda bordo situas montoj mezaltaj, iom pli malproksime montoj ĝis alteco 600 metra, — sed ankaŭ la suda bordo ne estas monotona: kelkloke la altajoj superas 300 metrojn. Sur ambaŭ bordoj evoluiĝis variaj formoj: sur la norda bordo en la baseno de *Tapolca* la internacie konataj bazaltaj „atest-montoj"* kun siaj divers-

**atest-monto:* insulmonto konservinta la originalan altecon, tavoliĝojn de detruiĝintaj terenoj.

Tihany

specaj formoj, ŝtonorgenoj, rokturoj; la duoninsulo *Tihany* kun siaj apudbordaj krutaj montdeklivoj kaj termofontaj konusoj; la kalkŝton-kaj dolomit-montoj kun rokmuroj kaj grotoj, belaj, mallarĝaj valoj.

En la hidrografio de la pejzaĝo kompreneble mem la lago estas dominanta, kun sia grandioza akvosurfaco, kolorfenomenoj, kelkfoje du metrojn atingantaj ondoj. La akvo, pro sia malprofundeco somere varmiĝas ĝis 25—28° C, kaj pro la relative granda mineral-enhavo ĝi estas kvazaŭ maldensa mineralakvo, — iom fore de la bordo: tute pura akvo. Ĉe lagborda somerumado gravaj faktoroj estas la dimensioj de akvotereno, la kvalito de akvo, ĝia movo (fluado, ondado), kvalito de la bordo, pureco de la aero. Per kelkaj vortoj ni jam menciis tiujn, nun sekvu iom da indikoj.

La refreŝiĝajn eblecojn grandparte influas la longeco de la bordo (195 km) kaj grandeco de la akvosurfaco (595 km^2). Laŭ rilato de akvosurfaco kaj bordlongo, do por unu km de la bordo disponeblas 3 km^2 da akvosurfaco, tiel antaŭ la bordo estas vasta tereno por banado, sporto, boatado kaj pasaĝerŝipa trafiko.

La plej grava elemento de flaŭro-faŭno de la Balaton-pejzaĝo estas unuavice tiu de la lago mem. Ne priparolante la multajn malgrandajn vegetaĵajn organismojn, la plej grava planto estas la kano, kiu estas ĉi tie ne nur pejzaĝformanta, sed ankaŭ biologia, bordŝirmanta kaj produkta faktoro. La najadacoj (akvoherboj, akvopesto, ktp.) — krom sia biologia rolo — malhelpas sinbanadon, akvosportojn kaj akvo-trafikadon, kaŭzantaj per tio gravajn problemojn. En la faŭno de la lago krom etaj animalaj organismoj plej gravaj estas la fiŝoj kaj akvobirdoj. La akvobirdoj grandparte estas ŝirmataj, kaj ili faras bunta kaj movriĉa la akvan sferon de la lago.

Sur la teritorio post la lago la plej gravaj elementoj de la flaŭro estas la arbaroj, kiel plej altgrada vegetalaro. Ili troviĝas kaj sur la montoj de norda bordo, kaj sur sudbordaj montetoj. Ties protektado almenaŭ ĝis la unua akvodisigejo, en natura stato, aŭ transformado de kelkaj partoj je parkarbaro, estas por la refreŝiga funkciado de la lago samtiel grava, kiel sur la teritorio de la banlokoj, kie la verdejoj, parkoj anstataŭas la naturan medion. Krom la protektataj izole starantaj arboj kaj maloftaj kreskaĵoj, vegetalaroj tre gravas la famaj, — kelkfoje historiaj — *arbovicoj*, *aleoj*, karakterizantaj ankaŭ la pejzaĝon, konsistantaj kelkfoje el region-speciaj arboj, kies konservado ofte kaŭzas diskutojn. En la faŭno de la bordregiono grandparte troveblas la enlandaj bestoj, vivantaj kutime en sovaĝo, — inter ili foje-foje eĉ tia speciala individuo, kia estas la cervo ĉasita apud vilaĝo *Marcali* proksime al la suda bordo, kies trofeo estis longtempe mondrekordulo.



Kanalizado ĉe Zamárdi (apud Balatono)

La regionon formantaj faktoroj de la Balatona pejzaĝo estas — kiel ĉie en la mondo — ne sole la naturaj donitaĵoj, sed ankaŭ la sociaj kreaĵoj, vivo, laboro, faraĵoj de homo en tiu regiono.

Tiu pejzaĝo jam tre frue, preskaŭ antaŭ du mil jaroj, iĝis civilizita, kiam ĝi aparteniĝis al la plej bone organizita ŝtato de la antikva tempo, al la Romia imperio, kaj tiel daŭre rolis en la historio. Ĝi iĝis historia regiono, ĉirkaŭ kiu popoloj, — influantaj la vivon sur aliaj teritorioj de Eŭropo (hunoj, gotoj, avaroj, hungaroj) — fondis landon, aŭ kiel potencaj konkerantoj (mongoloj, turkoj) militis por la hegemonio. Pri la varia vivo de tiu regiono atestas multaj trovajoj en la muzeoj kaj la nombraj artmonumentoj: vilaoj el antikvaj epokoj, mezepokaj fortikaĵoj, novtempaj kasteloj kaj atestantoj de la laboro de la popolo: la plurjarcentaj farmoj, vinpremilejoj, keloj.

La regiono de Balatono estas akcentite kulturejo, kiu multajn artistojn, poetojn, verkistojn inspiris je mirinde belaj kreaĵoj. Komencante ĉe Orientgota reĝo Teodoriko la Granda, ĉi tiu pejzaĝo gardas la memoron de multaj granduloj de nia patrio kaj de eksterlando, kiuj ĉi tie restadis. — Tion atestas la Balatona panteono en la fama kuracbanejo *Balatonfüred*.

Se ni komparas la ĉefajn naturajn kvalitojn de la Balatona pejzaĝo kun tiuj de aliaj Eŭropaj pejzaĝoj, unuavice ni devas rigardi ĝian situon. La lago kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kuŝas en la norda moderklimata zono, tra kiu de jarmiloj okazas la pli granda parto de la monda trafiko, proksimume meze de tiu terzono, inter la latitudoj 46° 35' kaj 47° 5'. En la baseno de Karpatoj kruciĝis — jam de praaj tempoj — landvojoj gravaj: la okcidenta, Eŭropa fino de la Azia silkvojo kaj la sukcenvojo kunliganta Italion kun la Balta Maro. Hodiaŭ la pli fora regiono de Balatono estas unu el la pordegoj inter Oriento kaj Okcidento kaj krome sur la fremdultrafika vojlinio de la malvarma Nordo al la varma Sudo. Ĝia situo fruktuzas la klimaton de modera terzono, kiu estas la plej agrabla el vidpunkto de fremdul-trafiko. La malgranda alteco super la marnivelo (ĉk. 105 m), kaj la malalteco de la ĉirkaŭlaga montaro prezentas klimatan avantaĝon kontraŭ lagoj sur sama latitudo, sed situantaj sur 500 m-a alteco super maro, kaj kelkfoje inter aŭsteraj du mil metraj montegoj. Krome ĝi donas pli sekuran, pli ripozigan refreŝiĝon. Lagmeze 3—4 m profunda, praktike ankoraŭ pura akvo certigas banadon pli varman kaj malpli danĝeran, ol la supre menciitaj lagoj, kies akvo estas tro profunda, la faŭno pli grandnombra, kaj pro industriaj poluakvoj infektita.

Akvonivel-regulado de Balatono

Kiel interesajon ni mencias, ke por tiuj, kiuj sur la korpohaŭto sentas malagrabla la salon eliĝanta el marakvo, Balatono — la dolĉakva lago — estas konkurenckapabla eĉ kontraŭ maraj ripozejoj.

En nia moderna, kureganta mondo ŝarĝita per multaj nocaj mediaj efikoj oni povas taksi speciala valoro de Balatono la sekvajn:

la originala natura stato, inkluzive la silento, pureco de akvo, de aero, grundo;

milda klimato, sunbrilo, — kompreneble unuavice por tiuj, por kiuj tio ne estas incita klimato;

la aparte bela natura medio;

la belaj aŭ interesaj homaj kreaĵoj kaj ties agordiĝo kun la pejzaĝo;

proporcio kaj harmonio inter pejzaĝo kaj kreaĵoj.

Ĉi tiuj faras komprenebla, kial iĝis Balatono kun sia regiono la plej ŝatata refreŝiĝa pejzaĝo de Hungario. La ĉirkaŭlagan refreŝiĝejan zonon difinis la *Balatona Regiona Plano*. Kune kun tio ĝi aranĝis la grandec-gradon de la koloniiĝoj, ilian rolosferon, skizis ĉefajn direktojn de la region-evoluigo. En tiu ĉi terspaco la enlanda kaj eksterlanda fremdultrafiko havas grandsignifan lokon inter la faktoroj de ekonomia evoluigo. La fremdultrafikan evoluon karakterizas ĉi tie, ke la utiligo de la lagakvo multe kreskis. Tamen nur tiam povas la refreŝigejo plenumi sian laŭdestinan funkcion, se en bon-orda, kulturita medio, ne densamase estas ĝueblaj la belecoj de pejzaĝo, akvo, medio, naturo. La ebla trouzo de la lago estas unu el la atakoj kontraŭ akvokvalito. Tre malfacile estas reguligi la fremdultrafikon. Do multe pli necesas esti pretaj por akcepto de la gastoj kaj organizite preventi la mediajn nocojn, ol administracie limigi la uzadon de la akvo.

Rilate la akvomastrumadon koneksan kun la lago, la farendaĵoj grupiĝas ĉirkaŭ sekvaj taskoj:

— malgrandigo de la ŝanceliĝo de akvonivelo,
— aranĝo kaj certigo de la lagbordo,

— malpliigo de la ŝlimiĝo de la lagujo,

— certigo de akvo-rekompletigo kaj de konforma akvokvalito,

— kontentigo de akvoprovizaj kaj kanalizaj pretendoj.

Tiujn taskojn oni povas solvi bonrezulte nur per antaŭvidema, sistema laboro, per kompleksa perspektivo, per ĝusta konsiderado kaj listigo laŭ graveco. Nome diversajn opiniojn havas en la prijuĝo de la farendaĵoj por la evoluigo de Balatono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo:

— la apudbordaj grundposedantoj kaj la strandaj sinbanantoj,

— la homoj serĉantaj silenton, trankvilon kaj senzorgiĝon,

— la fiŝkaptistoj, fiŝhokistoj,

— la sinbanantoj kun (eta) infano, kaj la naĝantoj,

— la boatistoj kaj velboatistoj,

— la agrikulturistoj posedantaj surbordan grundon, kaj la banejgastoj.

Ni povus daŭrigi nomlistadon, sed eble tiom suficas por sensigi la antagonismojn. Tiuj diversaj vidpunktoj ĉiam havas ian konekson, projekcion kun la akvomastrumado, ekzemple:

— iu serĉas la apudbordan malprofundan akvon, alia la profundan,

— iu la moleon, zorgatan promenadejon, alia la laŭbordan kankovritan, aŭ iom marĉan parton kun diversaj kreskaĵoj,

— la deziro konstrui ripozejon, staranta sola, bezonas alian evoluigon, ol vico da hoteloj,

— troviĝas fakuloj, kiuj opinias solvi la biologian ekvilibron de la lago per plimultigo de akvoplantoj (kano, helodeoj*, ktp.), aliaj fakuloj volus solvi tion per enlokigo de plantovoraj fiŝoj,

— kontraŭdiraj opinioj formiĝis en la prijuĝo: kiel zorgi pri la rekompletigo de laga akvo (riveroj: Danubo, Dravo, Rabo),

— gravan problemon kaŭzas la ĉesigo de industriaj akvopolucioj, — aŭ la irigacio per lagakvo, ktp.

Tiujn multajn antagonismajn interesojn oni devis harmoniigi per sistema projektado kaj konservado de la favoraj akvocirkonstancoj. Tio estas kondiĉo, por ke ni povu gardi valorojn de Balatono por ni mem kaj por la estontaj generacioj. Tiu tasko necesigas multflankan akvomastrumadan aktivadon, — antaŭvideman, science bazitan laboron. Tiun lastan servas esploradoj ĉe Balatono far hidrologoj.*

**helodeo:* akvoplanto kun densartikaj flosantaj tigoj (specioj: *akvopesto;* najadoj)

**hidrologio:* scienco pri akvo (pri ties fizikaj, kemiaj, teknikaj, biologiaj proprecoj); *hidrologo:* eksperto de hidrologio.

Akvoturo en Széplak

Hidrologiaj esploroj

La sisteman hidrologian ekzamenon de Balatono ekirigis en 1952 la *Akvomastrumada Scienca Esplorinstituto*, kiam — unuavice por ekkoni la akvomastrumadajn cirkonstancojn de Balatono — oni energie evoluigis reton de akvo-mezurlatoj, precipitaj- kaj vaporiĝ-mezuriloj. La kono de akvoekonomio de la lago estas grava unuavice por ke oni povu teni inter difinitaj limoj la nivelŝanĝiĝojn de Balatono per homa interveno: per reguligo de la akvokvanto ellasita tra kanalo Ŝio (eliranta ĉe banej-urbo *Siófok*).

Estis konstruita la esplorŝipo *„Balaton"*, kiu estas taŭga por restadi sur akvo lontane de bordoj eĉ dum ŝtormo. Laŭ la diversaj laboroj oni povas munti sur la ŝipon gvatturon, gruon, borturon, aŭ fosto-enbatilon, sed estas loko sur la ŝipo por la plej diversaj, hidrometriaj, fizikaj, hidrokemiaj* kaj biologiaj instrumentoj, aparatoj. Poste konstruiĝis alia ŝipo rekte por mezuradoj; sur tiu ŝipo estas ankaŭ kurentofonto. Tio ebligas uzon de plej diversaj elektraj kaj elektronikaj mezuraparatoj, inter aliaj ĝi estas utiligebla por funkciigo de eĥografo** kaj de subakvaj fotografiloj.



Földvár

En 1955—57 pretiĝis kompleta registrado de lagokuŝejo kie estis utiligata eĥografo per eĥo de ultrasonoj. Per tiu aparato ebliĝis preciza mezuro de la lozaj ŝlimtavoloj kaj de la kuŝejfundo. La sama aparato estis bone uzata ĉe esplorado de migrantaj ŝlimtavoloj.

En 1957 komenciĝis la sistemaj kemiaj kaj biologiaj akvoekzamenoj, kaj komence de la sesdekaj jaroj la aŭtomataj stacioj por registrado de nivelalteco, ondado kaj fluado. Krom tiuj okazis ekzamenadoj de ŝlimomigrado ankaŭ per radioktivaj kaj lumineskaj spursigniloj.

Por la hidrologiaj ekzamenoj iĝis necesa la kontinua mezurado, registrado ankaŭ de kelkaj *meteologiaj**** faktoroj. Por direktado de tiu multflanka laboro surloke oni establis la esplorstacion en *Balatonszemes* en 1962. De tiu loko estas bone atingeblaj ĉiuj observejoj, kaj tie estas konforma haveno por la esplor- kaj mezurŝipo.

Unua tasko de la esplorstacio estas certigo kaj kontrolo de la sistemaj, kontinuaj hidrologiaj, hidraŭlikaj kaj meteologiaj observoj koneksaj. Krom tiuj ĝi estas porokaza laborloko por diversfakaj esplorantoj kaj donas eblecon por specialaj ekzamenoj.

Akvorezervujo ĉe Balatonboglár



Tre gravaj estas pro praktikaj kialoj la ekzamenoj, mezuradoj koneksaj kun la ŝlimoziĝo de la lago. La nivelaltiĝo de lagfundo estas meze 0,35 mm/jaro, sed inter la jaroj 1930—1944 ĝi atingis jare 10 milimetrojn! Laŭ mezuroj de la stacio, la polvo falanta sur surfacon de la lago estas jare po 47 tunoj/km^2. Tamen la plej esenca faktoro de la ŝlimformiĝo estas tio, ke el la akvoj, venantaj en la lagon, sedimentiĝas kaj sidiĝas sur la lagofundon alkaliaj termetaloj pro la asimilado de la akvaj plantoj, kaj pro karbondioksido liberiĝanta sur granda akvosurfaco.

Inter la planoj de la esplorstacio troviĝas denova eĥografa mezurado de Balatono, sistema kontrolo de la materioj ŝvebantaj kaj solviĝantaj en enfluantaj riveroj, riveretoj kaj en akvo, elfluanta tra kanalo Ŝio, — krome la ekzamenado de la kalcio- kaj karbondioksid-ekonomio, serĉado de racia ŝirmad-maniero, kaj elekto de plej favoraj lokoj de la projektitaj dragadoj.

Akvo-nivel regulado de Balatono

La nivel-regulado havas tre gravan rolon por certigi konforman akvonivelon, respondantan al ĉiuj rajtaj pretendoj.

Laŭ la disponeblaj indikoj dum la kvarcent-jara regado de la romianoj okazis la unuaj teknik-karakteraj intervenoj en la vivo de Balatono — por reguligo de akvonivelo. Kvankam la romianoj konstruis ĉefe sur la norda bordo siajn vilaojn — defenditaj kontraŭ akvonivel-ŝanceliĝoj —, por sirmi la vojojn kaj ŝipajn transveturejojn oni forkondukis la superfluan akvon per kanalo Ŝio.

Post la Romia regado la tempestoj de la popolmigrado forbalais ĉion, kaj pli ol mil jaroj devis forpasi, ke denove povu komenciĝi la reguladoj, kies celo estis jam tiam, ke la nivelŝanceliĝoj okazu inter striktaj limoj.

Memkompreneble paralele kun la reguladoj iĝis pli ekzaktaj la instrukcioj de la akvonivel-reguligoj. La hodiaŭ valida dekreto difinas la akvonivelon por la unua tago de monato en intervalo de 20 cm. La ekstremaj limoj estas +45 kaj +100 cm, do la permeseta ŝanceliĝo estas entute 55 cm. Tiuj ĉi limoj ne ĉiam estas teneblaj okaze de klimataj anomalioj, respektive se en la akvoekonomia ekvacio iu ajn varianto alprenas ekstreman valoron. Tiel la reguligo eĉ hodiaŭ ne estas finita, ja en ĝia nuna stato la celo estas ĝuste tio, ke sendepende de la veteraj ekstremoj ĝi certigu konstantan akvonivelon, — en seka periodo per akvokompletigo, per racia limigo de akvouzado, — en malseka periodo forkonduko de la akvo sen kaŭzi malutilojn.

Ĉefaj interesatoj rilate Balatonon estis komence la agrokulturo kaj fiŝkaptado, poste — de 1846 — la ŝipveturado, kaj — de 1858 la Suda Fervojo. Ĉi tiuj havis antagonismajn dezirojn rilate la akvoni-

**hidrokemio:* kemio de substancoj troviĝantaj en akvoj
***eĥografo:* mezuraparato por registri distancon per eĥo
****meteologio:* termino uzata nun jam ĝenerale anstataŭ meteorologio.

Velšipoj sur Balatono.

velon. Ĉirkaŭ 1880 ni komencas paroli pri bankulturo, kaj ĝi progresive evoluas decida faktoro; ĝia pretendo estas: konstantigita meza akvonivelo. Plej nove por agrokultura kaj industria akvoutiligo plej favora estas la alta akvonivelo. Al tiuj alkroĉiĝas el vidpunkto de laga statkonservado du decidaj faktoroj: ŝirmado de la bordlinioj kaj anticipado de ŝlimoziĝo, de troa kreskado de najadacoj. Ankaŭ tiuj estas kontraŭdiraj, ĉar por la unua estas favora la malalta, por la pli posta la alta akvonivelo.

La ekkono de la koneksaĵoj inter la konstanteco de akvonivelo kaj akvokvalito, la efektivigo de la relative stabila akvonivelo, kiu estas samtempe dezirenda por malrapidigo de la *eŭtrofizacio,** — okazas en niaj nunaj tagoj. La certigo de plej favora akvonivelo, kaj de ĝia konstanteco ĝenerale okazas per reguligo de al- kaj el-fluo, aŭ per kombinado de tiuj du. Ĉe Balatono oni reguligas la nivelon per la elfluigo de la akvo. Cetere la akvonivelo de Balatono estas regulebla per ĝiaj naturaj provizoj, ja ĝia „akvobilanco" estas en la lastaj 50 jaroj pozitiva. La multjara meza kvanto de la superflua akvo forigita tra kanalo Ŝio, estas jare 408 milionoj da kubaj metroj. Tiu kvanto kompreneble ŝanĝiĝas de jaro al jaro, eĉ ene de jaro ĝi montras kaprican ŝanceliĝon. Ĝenerale aŭtune-printempe estas pozitiva la bilanco, sed, somere, en periodo de intensiva vaporiĝo ĝi estas negativa. La kvindekjara meznombro de la jara vaporiĝo signifas, ke 540 milionoj kubmetroj da akvo foriĝas en la aeron. Pro tio dum la someraj monatoj pro la vaporiĝo povas sinki la akvonivelo de la lago per monata 16—18 cm. Tial estas motivita printempe teni altan nivelon. Tamen pro la surbordaj konstruaĵoj ne estas daŭre permesebla ĉe *Siófok* pli ol + 100 cm-a nivelo. La lagakvo servas unuavice por refreŝiĝo, tial oni povas akvoforkordukon permesi ekskluzive nur por necesa nivelreguligo. Post fino de la nuntempe okazanta rekonstruado de la kluzoj, — la novaj kluzoj ebligas validiĝon de novaj preskriboj, kiuj konservante la 100 cm-an plej superan akvonivelon, por la opaj monatoj preskribos pli altajn akvonivellimojn, ol la ĝisnunaj estis.

(Daŭrigota en la sekva numero)

Tr. Alfonso *Pechan*

**eŭtrofizacio:* en la akvoj plimultiĝo de iuj nutromaterialoj, ĉefe de nitrogen- kaj fosforkombinaĵoj, kio estas noca, povas kaŭzi maljuniĝon de lago.

Intervjuo kun Marjorie Boulton

— Kial vi verkas Esperante?

— Tri gravaj faktoroj motivas mian Esperantlingvan verkadon: psikologia, morala kaj estetika. Mi komencis verki post malagabra emocia travivaĵo, — kiam iu perfidis min. Mi trapasis periodon, kiam mi pensis, ke se iu povas esprimi amon kaj tamen ĉio estas falsa, — en tiu kazo vortoj ne havas signifon. En tiu tempo mi ne povis verki en la angla. Mi estis en postkomenca tempo en Esperanto — kaj iun tagon mi verkis poemon... William *Auld* akceptis ĝin en „Esperanto en Skotlando", kaj skribis al mi kuraĝige. Esperanto savis mian poezian talenton, kaj eble ankaŭ la mensan sanon.

Kiam mi estis juna, regis grandparte en la mondo de la lernejoj granda prudismo kaj tiel nomataj moralaj principoj" aŭ eble malmoralaj! Kaj kiel instruistino, se mi verkis pri amo, mi riskis la postenon. Do, mi verkis Esperante. Nuntempe kompreneble jam sanĝiĝis la antaŭa situacio en Anglio.

Ju pli mi studas Esperanton, des pli mi admiras la estetikan valoron de la lingvo. Oni rajtas manipuli, eksperimenti sur ĝi, ĉar ĝi estas tre fleksebla. Mi ege amas la anglan, kompreneble, — sed ĝi estas multe pli rigida ol Esperanto, kies adaptebleco estas mirinda. Mi komencis studi ĝin, ĉar ĝi bone servas la homaron, toleremon, internaciismon.

— Kion vi opinias pri viaj propraj verkoj?

— Ili neniam estas tiel bonaj, kiel mi deziras. Ili neniam kontentigas min mem. Kiam mi rekomencos Esperantan verkadon, eble aperos iam pli matura poezia personeco. Pli intelekta, malpli naiva. Kvankam mia naiveco havis utilon.

Laŭ mia opinio, mia plej bona verko estas „Eroj", la longa poemo. Estus interese mencii, ke la lastajn versojn mi skribis en ia transo, kaj en Svedio, kiam mi laŭtlegis ĝin, mi sentis la samon. Mi tute mirigis la aŭdantaron tiam.

— Ĉu vi povus sumi vian vivfilozofion?

— Filozofion oni ne povas mallonge sumi. Miaj pensoj tre fluktuas laŭ miaj sentoj fizikaj. Tamen, kelkaj bazaj punktoj:

— granda sento de respekto antaŭ la mistiko de vivo;

— toleremo kaj larĝmenseco estas homaj devoj;

— ne kaŭzi malfeliĉon.

Mi ne pretendus koni la moralon de politiko. La komenco de la homa saĝo estas: kompreni, ke ni estas tre malsaĝaj. Mi estas di-kredanto, kiu malfidas la dogmojn kaj ne pensas aliĝi al iu ajn eklezio.

— Kie vi vidas vian lokon en la Esperanta literatura procezo?

— Mi ne sentas min pioniro. Mi vidas min poeto, kies talento estas en la dua grado, sed kiu havas profesian konsciencon. Tamen, se mi havas pionirecon, tio estas, ke unu el niaj plej fortaj virinaj voĉoj mi estas, kaj komence eble la ĉefa virina voĉo. Eble estas valoro ankaŭ en la larĝeco de mia temaro. Bedaŭrinde, foje-foje kiam mi renkontas legantojn, ili pensas nur pri amo kaj katoj. Mi petas miajn legantojn legi ankaŭ miajn aliajn poemojn. Mi skribas ankaŭ pri sociaj malbonoj, dio ktp., eĉ okaze poemetojn nur por ridigi.

Nun mi pensas pri humura poemaro, pri malgrandaj bagatelaj homaj aferoj; pri libreto por esperantisto, kiu amas Esperanton, ne nur poezion. Mi ne sentas, ke poeto malaltiĝas, se verkas ne nur artajn verkojn.

— Ĉu vi konsideras iun kiel vian antaŭulon?

— Jes, iasence. Certe la ĉefaj influoj de *Kalocsay*, *Auld*, Reto *Rossetti*... Legado de „Strečita kordo" retenis min al Esperanto. Mi sentas min influita de la tuta tereno de miaj fakaj studoj pri angla literaturo: John *Donne* kaj *Shakespeare* estas la plej fortaj influoj. La angla literaturo estas parto de mia vivo.

Unu el la avantaĝoj de Esperanta literaturo estas, ke mi komencis per altaj literaturaj kriterioj: mi ne kapablas verki fuŝpoemon. Mi legas verkojn en Esperanto de amatoroj, kiuj eĉ Esperante ne scias, ne parolante pri poezia talento.

Mi ankaŭ tradukas. La dua volumo de la „Angla Antologio" atendas eldonadon. Mia plej malfacila traduko estis poemo de *Browning: The Statue and the Bust*. Diable malfacila. Mia plej nova traduka ambicio estas la mezepoka longa poemo *„Pearl"*.

— Laŭ via opinio kiaspeca devus esti Esperanta literaturo, kion signifas „internacia" literaturo?

— Mi ĉiam verkas Esperante kiel homo, ne kiel anglino, — sed ĉiu ĉerpas siajn travivaĵojn el la nacia sojlo. Mi ne verkas poemojn pri japana te-ceremonio, ĉar tiu ne estas mia etoso. Kiam oni verkas, ankaŭ devas pripensi la internacian legantaron. Ĉiu granda poeto (aŭ kiu ambicias) ĉiam inklinos celi la universalecon (vidu Shakespeare). Sed mi kredas ankaŭ, ke ne estas saĝe strebadi al universaleco ĝis

tiu grado, ke ni rezignu nian personecon. Ĉiu poeto havas individuecon, kaj oni devas tion gardi.

— *Kiel vi prijuĝas la nivelon de nia literaturo?*

— Mi povas diri: ni ne havas *Shakespeare, Milton.* La plej gravaj verkoj estas la poemoj de *Kalocsay, Auld, Tárkony, Baghy* (romanoj!) kaj kelkaj aliaj. Ili povas kompariĝi al naciaj literaturoj. En naciaj literaturoj estas multo da duagrada poezio — multaj nacilingve meritplenaj verkoj estas el la dua grado —, en naciaj lingvoj aperas pluraj verkoj, kiuj ne meritus aperon. En Esperanta literaturo estas pli alta proporcio de relative bonaj verkoj, ol en la naciaj lingvoj. En Esperanto ne estas librokomerco, kaj en Esperanto oni ne verkas por „boli la poton." Lingvo, kiu aperis en 1887, ne povas atendi pli multon. Ni havis tre bonan fruktadon dum tiu tempo. En la angla literaturo, de la komenco, ne estis ia alia Shakespeare. La opinioj diferencas pri la elstaruloj, sed eĉ la angla havas malmulte da Kalocsay-tipaj figuroj.

— *Kion vi opinias pri Julio Baghy?*

— Li estis verkisto, kiu suferis pro la populareco. Li verkis multajn bagatelojn por *pedagogiaj celoj,* kaj pro tio kelkaj opinias lin duagrada. La bagatelajn poemojn li intence faris. Li havas tre bonajn, profundajn kaj fajlite verkitajn poemojn: li estis artisto. Parto de vigla, verva personeco speguliĝas en la verko, — ne povas disiĝi la du. Baghy verkis laŭ artaj kriterioj. Li verŝajne ne vaste legis el aliaj literaturoj, kaj tamen en „*Hura!*" kaj en multaj poemoj li havas tre originalajn, intelektajn pensojn. Mi tre estimas, ke li estis ege sendependa kaj konscienca.

— *Ĉu vi trovis multe da hungarismoj en lia lingvaĵo?*

— Mi ne trovis, sed mi ne estas observema.

— *Kiujn vi konsideras la plej elstaraj nuntempaj verkistoj?*

— Tre vibrigas Albert *Goodheir* — subite li aperis sur nia firmamento. Mi devas konfesi, ke mi ne tro multe legis nuntempe pro okupiteco kaj mi ne ŝatus esti maljusta... Gravas *Waringhien Tárkony, Dinwoodie* (poemaj meritoj), kaj *Ragnarsson, Nogueira* (promesplenaj, modernismaj).

— *Ĉu vi pensas, ke la traduk-literaturo havas tiajn grandajn figurojn kiel antaŭe?*

— Eble ne kiel antaŭe, ĉar ĝia funkcio estis la pruvo... Kaj ni jam pruvis! Sed ĝi daŭre valoras, plilarĝigas la literaturon, portas kulturon al tiuj, kiuj alimaniere ne havus ĝin. Mi havas pri tio personajn spertojn. Mem por la verkistoj ĝi estas ege valora ekzercado.

— *Kore mi dankas la intervjuon en nomo de la Esperanta Fako de la Universitato Eötvös Loránd kaj de Hungara Vivo.*

Oksfordo, 1976.

Ildikó *Király*

Aventuroj de la „Alexander-libroj"

Inauguro de tibetistika kolektaĵo en la Hungara Akademio

Tibetistiko — scienca branĉo okupiĝanta pri lingvo, literaturo, historio de Tibeto — kaj la nomo de Sándor *Kőrösi-Csoma* jam ekde 150 jaroj estas konceptoj neseparebla j. La granda hungara scienculo-vojaĝanto, volante trovi la prapatrion de hungaroj, alvenis al la mistika Tibeto, lando de lamaoj, kie li ekloĝis en la klostro „*Zangla*" kaj ekokupis sin pri lernado de Tibetaj lingvo kaj literaturo. Li konkeris tute novan terenon de sciencaj esploradoj; ĝis tiam Eŭropo preskaŭ nenion sciis pri tiu malproksima lando, ĉirkaŭita de nepenetreblaj montaregoj, inter kiuj regas la spirito de lamaismo. Kőrösi-Csoma pasigis nur dekses monatojn en la klaŭstro (en la jaroj 1823—24), sed tia mallonga tempo sufiĉis al li por akiri la bazan scion por poste krei la tibetistikon.

Kiam de sia kvara vojaĝo li alvenis al Kalikato (Indio), laboris kiel bibliotekisto de Azia Societo ĝis 1842, kiam li denove ekvojaĝis, sed jam ne atingis la celon, mortis dumvoje pro malario. Tiam liaj 36 libroj jam estis bone garditaj ĉe kolego-amiko S. C. *Malan,* sekretario de Azia Societo. Inter ili troviĝis la kvar „*Alexander-libroj*" (Alexander-Aleksandro-Sándor), kiujn la Tibetaj lamaoj mem verkis, respondante al la religiaj, lingvaj, literaturaj, sciencaj demandoj de la juna lernanto Sándor Kőrösi-Csoma. Unu el ili analizas la devenon de la vorto „Buddo", konigas la dividiĝon de la sciencoj laŭ Tibeta koncepto; sed alia libro estas eĉ pli interesa: ĝi titoliĝas: „Respondo al la demandoj de la Hindoeŭropa *Sken-dha*" (Sken-dha estas nomo de Kőrösi-Csoma en Tibeta lingvo).

La historio kaj aventuroj de „Alexander-libroj" estas tiel interesa kiel la vivo mem de ilia posedanto. *Malan* kunportas ilin al Anglio, kien post la hungara liberecbatalo (1848—49) alvenas Tivadar *Duka,* advokato, iama soldato de la *Görgey-regimento.* Li akiras kuracistan diplomon en Anglio, kaj poste vojaĝas al Indio por labori en la India angla armeo. Retiriĝinte, li okupiĝas nur pri vivo kaj aktiveco de Kőrösi-Csoma, kaj akiras de Malan por la Hungara Akademio la ege valorajn librojn de la mortinta scienculo: Malan donacas al la Akademio la librojn, kiuj alvenas en Hungarion en 1885.

Dum multaj jardekoj la libroj dormetis en la biblioteko de la Akademio, neniu okupiĝis pri ili, ĝis kiam aperis la posteuloj de Kőrösi-Csoma, la novaj tibetistoj, kiuj malkovris la gravan trezoron, kaj surbaze de ili sukcese daŭrigis la esplorojn de Kőrösi-Csoma. Tiel el la 36-libra kerno estiĝis granda, 3000-voluma tibetistika kolektaĵo.

Tiun kolektaĵon — kiu estas parto de la pli vasta orientalistika kolektaĵo — inaŭguris la Akademio, la lastan tagon de la konferenco, kiun la *Kőrösi Csoma Societo* aranĝis en *Mátrafüred.* La konferencon pasintjare kaj inaŭguron ĉeestis multoj famaj tibetistoj, inter ili la hungara akademiano Lajos *Ligeti,* la franca A. *Stein* kaj la soveta S. D. *Dilikov.*

VHZS

ZIGZAGE TRA LIBROLANDO

Naskitaj sur la ruino Okinavo. Originala romano de *Miyamoto* masao. Eld.: Librejo Pirato (Japanio), 1976. 147 p., 18 cm.

Ĉu vi kuiras ĉine? Originala kriminalromano de Johán *Valano.* Eld.: Dansk Esperanto Forlag, 1976. 136 p., 19 cm.

Kiel akvo de l'rivero. Originala romano de Raymond *Schwartz.* Dua eldono. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. Du volumoj, kune 487 p., 19 cm.

La Senlingvulo. Romano de V. G. *Korolenko.* El la rusa lingvo tradukis M. *Ŝidlovskaja.* Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 191 p., 19 cm.

Venis viro. Kriminalromano de N. *Torben.* El la dana lingvo tradukis Gudrun *Riisberg.* Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 72 p., 19 cm. Prezo por Hungario: 45.— forintoj.

Nia originala prozo. Literaturhistoria skizo de H. *Apolloner.* Eld.: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 58 p., 19 cm. Prezo por Hungario: 30.— forintoj.

Dum la noktoj kaj aliaj kantoj. 22 originalaj Esperantaj kantoj de M. *Hill,* D. *Hill* kaj W. *Auld.* Kun muziknotoj. Eld.: Brita Esperanto-Asocio, 1976. 70 p., 21 cm.

Por la paco (N-ro 12). Redaktis: V. *Samodaj.* Kolekto de artikoloj kaj literaturaĵoj. Eld.: Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo, 1976. 48 p., 19,5 cm.

Eble la plej agrabla specialaĵo de la supra listo estas la apero de du novaj originalaj romanoj, kaj a reeldono de la ampleksa majstraĵo de Schwartz: *Kiel akvo de l' rivero.* Ĉi-lasta verko certe ne bezonas rekomendon, ĝi jam sufiĉe famiĝis, kaj ĉiuj — ne nur la kritikistoj, sed ankaŭ la publika opinio — konsideras ĝin unu el la pintoj de la originala prozo.

El la du novaj romanoj la pli ambicia estas nepre tiu de *Miyamoto.* Kvankam la aŭtoro avertas, ke la verko enhavas ankaŭ fikciajn elementojn, la tuto impresas kiel memorskribo, malgraŭ tio, ke *Miyamoto* ne parolas en „mi"-formo. Tamen estus pli prudente, se li ne tiom strebus al senpersoneco — kio, cetere, en si mem neniam garantias objektivecon —, ja ĉiuvorte senteblas, ke la aŭtoro mem travivis la priskribitajn terurajn eventojn en la militkaptita tendaro sur la „ruino" Okinavo. *Miyamoto* faras politike akrevidajn konkludojn: li ne ŝparas kritikojn kontraŭ la *„tennoismo",* kiu kondukis Japanion en la faŝisman militon, sed atentigas ankaŭ pri la danĝero, kiu kuŝas en la ĉeesto de la liberigintoj, t. e. la usonanoj.

Ĉu vi kuiras ĉine? estas agrabla detektivromano, verkita en profesia nivelo. Ĝi ne sekvas la klasikan nure-logikan modelon de A. *Christie,* sed tiun de la sent-nuancitaj *Simenon*-verkoj. Kaj dum la simpatia detektivo Jano Karal esploras la cirkonstancojn de la juna farbisto Paŭlo Jorli, la leganto ekscias multon pri la diversaj politikaj movadoj interne de la junularo en la okcidentaj landoj. Meritas apartan laŭdon la eleganta kaj sprita lingvouzo de *Valano* — sed fortan mallaŭdon tiu ĉi nova pseŭdonimo en la Esperanta literaturo.

La temo de romano de *Korolenko* — kiu aperis en Esperanto unuafoje en 1922 — plenrajte kalkulas pri interesiĝo inter esperantistoj. La verko priskribas la tragikajn kaj tragikomediajn suferojn de simplaj rusaj kamparanoj, forlasintaj sian landon: vivi „sen lingvo" estas vere malfacilege. La tradukintino, Maria *Ŝidlovskaja,* estas klasika figuro de la Esperanta proza tradukarto: antaŭ 50—70 jaroj aperis multaj bonstilaj tradukoj el ŝia plumo.

Venis viro de N. *Torben* estas detektivromano tute ne kliŝa. Patro — kiu cetere estas eks-detektivo — serĉas la murdinton de sia filo. Kiel fono de la romano aperas la problemaro de la okcidentlanda junularo. La historio estas tre streĉe konstruita, kaj la verko entute apartenas al la kremo de sia speco.

La libro de Heide *Apolloner* ŝtopas breĉon, ja taŭga konsultlibro pri *Nia originala prozo* mankas. La libreto kompreneble havas la malvirtojn de la pionireco: el tiuj la ĉefa estas, ke *Apolloner* limigas sin al nura prezento de la verkoj, sed konkludojn, juĝojn donas tre malofte. Nepre apartenas al ĝiaj virtoj la kompleteco: ĝi liveras novajn informojn eĉ al konantoj de nia literaturo, kaj ĉefe, ĝi vekas la intereson de la legantoj pri la prezentitaj verkoj.

La kantokolekto *Dum la noktoj ...* estas agrabla unikaĵo. En ĝi aperas originalaj Esperantaj kantoj, kun tekstoj plejparte el la plumo de W. *Auld,* kaj muziko de D. *Hill* kaj M. *Hill.* Ĉar fakte temas pri muzikigitaj poemoj, mi ne tre optimismas koncerne ilin, tamen mi esperas, ke ili atingos — eĉ se ne vastan popularecon — plurfojan publikan eksonigon.

El Moskvo alvenis nova kajero de la serio *Por la paco,* laŭ vico la dekdua. Ĝi proponas ankaŭ ĉifoje interesajn legaĵojn: aperas artikoloj, tuŝantaj la temojn de Helsinki, deklaro de la soveta registaro pri la problemaro en Mez-Oriento, kaj aliaj materialoj. Vera frandaĵo por literaturamantoj estas la rakonto de *Saltikov-Ŝĉedrin: La saĝega gobio.* La kajero estas ilustrita.

Alvenis la somero, sezono de feriado: jen tempo, kiam eĉ personoj ĝenerale okupitaj trovas ĉiutage horeton por legado. Do, ekvojaĝante ne forgesu meti en vian valizon unu-du ankaŭ el la supraj libroj.

Vilmos *Benczik*

Hungara Fervojista Mondo — jubileas

Antaŭ dudek jaroj aperis la unua numero de Hungara Fervojista Mondo: en julio 1957. Malmultaj E-revuoj povas fieri pri dudekjara regula apero sen interrompo, eĉ sen ŝanĝo de titolo, — sekvantaj la komence elektitkan difinitan, celon: doni fakan revuon en la manojn de fervojistoj esperantistaj por servi ne nur la hungaran, sed ankaŭ la tutmondan fervojistaron.

Hungara Vivo, nun fininta sian dekkvin-jaran, simile kontinuan aperadon, omaĝas ĝoje al sia kvin jarojn pli aĝa gazetfrato, kaj esprimante gratulojn elkorajn, ni citas kelkajn indikojn pri tiu valora, belaspekta, fake kaj lingve altnivela revuo.

Fondinto de la revuo estas d-ro István *Bácskai*, prez. de Fervojista sekcio de HEA (ĝi estas hungara sekcio de de Int. Ferv. E-Federacio: IFEF). Tiu sekcio estas eldonanto de HFM, ricevante valoran apogon de Sindikato de Hungaraj Fervojistoj.

HFM aperis komence per *Rotaprint*-procedo jare po 4 numeroj en formato A/4. De 1963 ĝi aperas en bela presita eldono kun multaj ilustraĵoj sur 18 paĝoj. La senripoĉan aperon prizorgas presejo en urbeto Vác (v. HV 1976/4 sur paĝo 8.). La komenca eldonkvanto de 500 ekzempleroj baldaŭ kreskis je 1000, kies pli ol duonon ricevas la membroj senpage, la cetera parto estas sendata al Eŭropaj, eĉ al trasmaraj landoj, al fakaj instancoj kaj aliaj interesatoj. Ĝi ne estas abonebla, sed ricevebla interŝanĝe kontraŭ E-revuoj, libroj.

Respondа redaktoro estas de komenco d-ro I. *Bácskai*, la redaktadon prizorgis S. *Csóra* ĝis sia morto en 1965. Tiam tiun taskon transprenis redakta komitato dum kvar jaroj. Depost 1969 redaktoro estas P. *Kristek*.

Laŭ sia profilo la revuo komunikas utilajn kaj interesajn artikolojn pri parencaj terenoj de la trafiko, fake kaj lingve valorajn sciigojn, raportojn pri fervojaj novaĵoj, internaciaj rezultoj utiligeblaj kaj en Hungario kaj en aliaj landoj. Aktualaj fakaj kaj riportfotoj ankaŭ el la E-a movado ornamas la paĝojn (ekz. en la lasta n-ro 18 fotoj).

La revuo servas ankaŭ la kulturan interesiĝon de la fervojistoj, donante — krom la supre menciitaj — informojn pri literaturaj, artaj, eĉ pri sportaj eventoj. Aparte menciindaj estas ĝiaj meritoj en prilaboro de la faka lingvo, kiun servas kontinuaj artikolserioj — en facile komprenebla kaj utiligebla formo kaj stilo, — eĉ formiĝis el membroj de redaktoraro-kunlaborantaro speciala laborgrupo, kiu jam de pluraj jaroj en internacia akordigo preparas la E-an parton de seplingva terminaro.

Korajn bondeziojn ni sendas al la revuo kaj al tiuj, kies laboro rezultis tiujn belajn du jardekojn: *„per aspera ad astra!"**

A. P.

*(latina:) per aspra (vojo) al astroj (al gloro)

ALDO DE ĢIORĢI

ESTAS KIEL VI

Petalo de rozo,
delikata kaj parfuma,
loge kolora,
estas kiel vi:
ĉarmo kaj inspiro
unutaga
aŭ unuhora.
Petalo de rozo:

tagotriumfo.
Morgaŭ: putro kaj ŝimo.
Estas kiel vi:
zenito de l' sensoj.
Post la ebrio:
naŭzo kaj deprimo.

TIBOR UJLAKY-NAGY

Kun doloraj sentoj ni komunikas, ke la 6-an de junio mortis Tibor *Ujlaky-Nagy*, membro de nia redakta komitato, — post kvaronhora suferado pro akuta infarkto. Lia forpaso vekas kunsenton de ĉiu, kiu lin konis.

Tibor Ujlaki-Nagy naskiĝis la 22-an de jan. 1915 en Budapeŝto. Li lernis E-on en 1932 aŭtodidakte kaj perfektigis sin multe legante, ankaŭ per Plena Gramatiko. En 1947 li akiris la lingvo-instruistan diplomon ĉe la Ekzamena Komitato de HEA. Ujlaky-Nagy jam por la unua numero de HV verkis artikolon kaj estin redakta komitatano de HV ĝis sia morto.

Lin karakterizis profunda kono de E, — konscie li prípensis ĉiun frazon, ĉiun vorton, ĉu en originalaj, ĉu en tradukitaj artikoloj, ame priatentis ĉiun numeron de HV, kaj kontribuis multe por lingva ĝusteco, lingva altigo de nia revuo. Li estis eminenta fakulo de la sporta lingvo, en 1972 aperis lia 304 paĝa libro sub titolo *„La sporta lingvo en Esperanto"*. Li estis kunlaboranto de Duden-tipa vortarego de Eichholz, antaŭjare ankaŭ tiu de la E-a parto de unua volumo de la *Seslingva Geodezia Fakvortaro*. La subita morto malhelpis lin por ke li finlaboru sian grandan Sport-vortaron Esperantan.

La redakcio de Hungara Vivo triste partoprenas en la funebro de la kara vidvino kaj familio.

Redaktoraro de Hungara Vivo

PLANLINGVOJ



La historio de la interlingva ideo montras abundon da plej variaj formoj de la lingvoplanoj. Ili estas apartigeblaj jene:
— horizontala 2.: — vertikala 43, — vertikala 1. kaj — vertikala 60.: — horizontala 68. (sonigita, filozofia, skematika) — vertikala 11. (vert. 29, minimuma, kompromisa).

Ensendi sufiĉas la solvon de la supraj vicoj ĝis la 1-a de aŭg. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 2. *Scienca nomo de tiuj skribaj planlingvoj, kies sistemon konsistigas signoj legeblaj en ĉies propra lingvo* 12. Interparolo (R) 14. Interna deklivo de fosaĵo (R) 16. Deziro de tio, kion alia posedas 17. KLM 19. Ĉefurbo de Japanio 20. Fordonaci ion multevaloran (R) 21. Infanludilon 23. Frukto kun malmola ŝelo (R) 24. Produktaĵo de la hepato (R) 25. Trafikas sur akvo 27. Abrupte trafi (R) 28. Radono 29. Ekscitas la atenton de iu 31. Interjekcio de malkonsento. 32. Rusa skurĝo (R) 33. Ŝmiri per grasa fluaĵo 35. Pasigi tra penetrebla tavolo (R) 39. Eŭropa lando (R) 41. Internacia Scienca Asocio Esperantista 42. Plirapidigi (R) 45. Fadenforma epiderma elkreskaĵo 46. Faras pli malgranda la distancon 49. Jean Forge 51. Natrio kaj sulfuro 52. Prepozicio 53. Identaj vokaloj 54. Estiĝi (R) 56. Felix Zamenhof 58. Muron kovras per mortero (R) 60. Libera spaco ĉirkaŭita de domoj (R) 61. Komunikos 62. Derivilo de perfekto 64. Maro apud Jugoslavio 66. Kolvesto (R) 67. Spekuli pri la spezoŝanĝo (R) 68. *Eco de lingvo, konsistanta el arbitre elpensitaj elementoj.*

VERTIKALAJ VICOJ: 1. *Lingvoj havantaj sistemon de desegnoj, ideogramoj kaj hieroglifoj* 2. Paŭlo en slavaj lingvoj 3. Lokŝanĝo por ĉeesti (R) 4. ... logio — scienco pri bestoj 5. Sufikso esprimanta, ke io (iu) estu ia 6. Vojo de vagonaro 7. Fabela estaĵo (R) 8. Sufikso por esprimi profesiulon 9. Frakcia numeralo (R) 10. Jakobo — slave 11. *Eco de lingvo, baziĝanta sur elementoj de naturaj lingvoj* 13. Hometo (R) 15. Ridaĉo kun malica mieno (R) 17. Parto de vagono (R) 18. Laŭ kaprica ĝenerala kutimo 21. Angla politikisto, ĉefministro dum la Napoleon-aj militoj, unuiganto de Irlando kaj Anglio (William, 1795—1806) 22. Fiŝkaptilo 25. Kuntorditaj fadenoj (R) 26. Natrioklorida 29. *Tia estas lingvo, baziĝanta sur la etnaj lingvoj* 30. Verbo pri ekz. serpento 32. Ŝtopilo (R) 34. Instigas 36. .../AS/OS 37. Nomo de latina litero (R) 38. Disĵeti grajnojn sur la tero (R) 40. LR 42. Ĝin ĉirkaŭas rado (R) 43. *Karaktero de skribsistemo uzanta romiajn kaj arabajn ciferojn.* 44. Violkoloro (R) 47. Paradizo en la dezerto (R) 48. Aereska materio (R) 50. Fari entajlon laŭlonge en lignaĵo, metalpeco 53. Teatra artisto (R) 55. Virnomo (R) 56. Loĝanto de akvoj 57. Mondfama franca verkisto (Emile) 59. Unuiĝo 60. *Parolebla planlingvo* 63. ITA/.../OTA 65. Konjunkcio post supereca aŭ malsupereca komparativo 67. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj estuloj aŭ objektoj.

Imre *Szabó*

LINGVAJ LUDOJ

Denove ni ĉerpas el la ensenditaj leteraj kontribuaĵoj de niaj kunludantoj. El multaj ni elektis la sekvajn sukcesajn palindromojn, respektive vortekvaciojn.

Nora trovu vortaron.
Eva sidis ave
(sendis: V. *Arolovič* el Moskvo)

Nova nadlo savas oldan avon
Sarkas eskim' sur ora maro, rus' mikse sakras.
(Inĝ. Karel *Janoušˆ*, Ostrava)

Sobra fein' ie farbos.
Sudanano onanadus.
Sola filo kara karakoli falos.
Notaria laboro: balai raton.
(s-ino Bella *Sipos*, Budapeŝto)

Gratulon al ili, precipe al s-ro Janoušˆ, kiu per la prezentita longa palindromo atingis rekordon!

Vortekvaciaj solvendaĵoj:

Fluida manĝaĵo (R) + skrapi kampon (R) + efiki, funkcii = doni pli multe da mono ol bezonate.

Femalo (R) + moviĝo de aero (R) + amaso de samspecaj objektoj = listo de objektoj, varoj apartenantaj al ies havaĵo

(G. *Tkeŝelaŝvili*, Tbilisi)

Fluaĵo por skribi (R) + veni kiel gasto (R) + multekosta metolo = membro de iama eklezia tribunalo.

Spaco destinita por io + kialo = vapormaŝino kun radoj

(Adolf *Staňura* el ČSSR)

Pagilo + viro el Eŭropa lando = ekskluziva rajto fabriki aŭ vendi ian komercaĵon.

Sciigi deziron (R) + stato de tio, kio brulegas = ekspodilo por signalo aŭ amuzaĵo.

(Zsuzsanna *Csiszár*, Várpalota)

ŝAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: D-ro Jozefo *Németh*
6-a numero:
JOZEFO SZÖGHY
(Budapest)
— originala —



Mato en 2 movoj (komencas Bl.)

Bl.: Rf7, Dg7, Tc3, Th6, Čb2, Čc5, b4, c6, h5 (9)
Ng.: Rd5, Ka3, Kb5, Čg1, c7 (5)
Limtado de la solvo: *20-a de julio* (sur la koverton: „ŜAKO"). Ĉiujare ni donos premiojn 3 foje (po 2 pecojn). La solvo de la 5-a problemo: ŝlosilmovo estas *l. Čb7!*

Kiuj deziras korespondi pri ŝako — bonvolu skribi al rubrikestro (kiu kore peros el kiu ajn lando!).

ŜAKLEKSIKONETO

László Tóth (1895—1964) la plej diligenta aganto de la hungara ŝako. Li naskiĝis kaj mortis en urbo Kecskemét — kaj vivis por la ŝako!

Li estis fondinto kaj dum 29 joraj redakisto de la revuo *Magyar Sakkvilág* (Hungara Ŝakmondo); eldonis plurajn dekojn da ŝaklibroj, kaj iĝis la plej eminenta verkisto de la hungara ŝakliteraturo. Li partoprenis la reorganizon de la Hungara Ŝak-Asocio, organizis plurajn internaciajn ŝakturnirojn. Eminenta ankaŭ kiel politikisto, lia urbo starigis monumenton al li; pluraj pionirtrupoj portas lian nomon. Je lia memoro estas regule organizataj ŝakturniroj en Kecskemét (en marto okazis jam la 6-a Internacia Turniro de Grandmajstroj).

Ĉu vi satas la revuon de Hungara Esperanto Asocio?

Konigu al viaj amikoj, ke ĝi aperas ekde 1961. dumonate, sur 32 paĝoj, ilustrite, grandformate.

Ĝia titolo estas Hungara Vivo, do kompreneble nia revuo publikas tradukaĵojn el hungara literaturo, novelojn, poemojn, artikolojn, kaj interesaĵojn pri la hungara scienco, arto, ĉiutaga vivo, tamen en ĝi vi povas legi la *plej multajn novelojn, poemojn, studojn ktp. ankaŭ el la originala Esperanta literaturo.*

Se vi jam legas regule nian organon, kaj plačas al vi Hungara Vivo, bonvolu rekomendi al viaj amikoj, konatuloj, klubanoj!

Se por iu estas ankoraŭ nekonata HV, petu de ni provnumeron!

Kaj se vi deziras kompletigi jarkolektojn de HV (nur ekde 1969), skribu al la redakcio, kaj se ni havas la mankantajn ekzemplerojn, kontraŭ egalvalorajoj (ekz. Esperantaj libroj) ni sendos, ilin.

La abonprezo (en Hungario) estas por jaro Ft. 48.— al eksterlando krome 9.60 por afranko.

Peranto al ekstrelando: KULTURA, H—1389 Budapest P. O. B. 149. Abonprezo por unu jaro 7— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto.

Redakcio de HV

Humuro

Vana peno. Posedanto de malgranda FIAT lavas sian ĉaron. Li ĝuste surveršas ĝin per akvo, kiam preteriras lia najbaro kaj diras:

— Vane vi ĝin akvumas, ĝi ne kreskos pli granda!

* * *

Senembarase. Viro kun pli ol iom da vaporo en la kapo elpaŝas el restoracio kaj diras al homo kiu staras antaŭ la pordo en orpasamente ornamita uniformo:

— Venigu taksion, sed tuj!

— Aŭdu, he, mi ne estas pordisto sed admiralo!

— Admiralo? Tiam venigu ŝipon!

* * *

Ĉion sialoke. Sinjoro en poŝtoficejo provas skribi depeŝon per plumo metita por la publiko, sed ne sukcesas: la plumo kraketas, skrapas, ŝprucigas, nur ne skribas. Fine li kolere ŝovas la plumon sub la nazon de poŝtoficisto:

— Diru, ĉu per tiu ĉi plumo subskribis Napoleono la Vienan packontrakton?

El post la fenestreto seke sonas la respondo:

— Informado ĉe la fenestro numero 8.

* * *

Diferenco. Oni demandis faman filmstelon, kio estas ŝia opinio pri la inteligento de la viroj kaj virinoj.

— Estas eble, ke la viroj estas pli inteligentaj — ŝi diris. — Sed ankoraŭ neniam mi aŭdis, ke virino edziniĝis al stulta viro nur tial, ke li havis belajn krurojn.

* * *

— Akuzato, ĉu vi sentas vin kulpa?

— Mi ne scias tion diri, estimata juĝistaro, ĉar mi ankoraŭ ne aŭdis la atestantojn.

* * *

Ŝoforo bremsas ĉe vojkruciĝo, kaj ĉedorse aŭto ege puŝiĝas al lia ĉaro. Kolera virino el ĝi descendas kaj atakas la surprizitan ŝoforon:

— Ĉu vi ne scias atenti?! Vi estas hodiaŭ jam la tria, al kies ĉaro mi puŝiĝas!

* * *

Najbarinoj interparolas:

— De kiam mia filo lernas en la universitato, li skribas hejmen strangajn leterojn. Antaŭ nelonge mi devis preni la vortaron de fremdaj vortoj, por kompreni la leteron.

— Tio estas ankoraŭ bona — diras la alia virino. — Kiam mia filo skribas, tiam ni devas tuj preni la ŝparkasan libron.

* * *

Oficiston lia direktoro vizitas en la hospitalo kaj diras al li:

— Mi konfesas, kara kolego, ĝis nun mi opiniis, ke vi nur simulas. Sed nun ĝoje mi vidas, ke vi vere estas malsana.

* * *

Ĉe la komponisto estas gastoj. Li surmetas tre bonan diskon.

— Bonega! — diras unu gasto. — Ĉu via komponaĵo?

— Ankoraŭ ne.

LETERKESTO

Rein Kiviaru, SU-Estonio, Viljandi: Se Literatura Matiejo plačas i. a. pro manko (?) de lernolibroj por progresantoj, ni devas aldoni, ke la rubriko strebas helpi en studo de pli artaj stilo kaj esprimmaniero. Dum literatura verkado — originala aŭ traduka — oni konfrontas* ofte specialajn problemojn; kiel vi rimarkis, ni prenos diversajn metodojn por konduki la studemulojn, ke ili mem trovu pli pretendajn solvojn dum verkado. — *Noveloj,* kiel promesite kaj videble, ne mankos! Plezure, ke ni kontentigis vian interesemon inter aliaj temoj ankaŭ pri hungaraj *artistoj,* inkl. E-istaj — ni sekvos tiun linion. Pri la »surpriza« por vi kolora *Csontváry*-bildo vd. sube

Jámbor Imre, Rumanio, Oradea: Nia informo pri libreto EL STREČITA KORDO de Kalocsay (1976/6.) havis bedaŭrinde mankon: ties Hungarlanda prezo estas 12 Ft (eksterlande 3 Gld.). La kolora reproduktaĵo sur la n-ro 76/6. akiris ankaŭ aliloke tiel vastan ehon, ke ni estas instigataj fari simile če la ĉijara 6. n-ro! Ni konsentas kun vi kaj aliaj multaj, ke la tradicioj de HV devigas nin sencese levi ĝian nivelon laŭ enhavo kaj aspekto.

Paul Boden, DDR-8514 Pulsnitz: Ni danke akceptas vian prijuĝon , ke la n-ro 76/5—6. enhavis iom malplimulte pri aktualaj aferoj de hungara vivo,ol kiom vi atendis de HV. Sen ekskuza intenco ni aludas al n-roj 76/4 kaj 77/1, kie kontraste almenaŭ duono de la revuo temis pri la nuntempa Hungario. En dumonata revuo apenaŭ eblas teni la proporciojn en ĉiu numero samgrade; ja nia arta kaj literatura revuo deziras esti aperta pro nia internaciismo al kulturaj fenomenoj de Esperantio, al plej gravaj problemoj de antaŭenigo de IL. La ĉiutagaj movadaj informoj pli freše legeblas en multaj E-gazetoj; kaj se oni konsideras ankaŭ la historian parton de HV — la proporcio de h. vivo tuj altiĝas. Cetere, multaj menciitaj temoj hungaraj estis jam en pli fruaj numeroj de HV traktitaj; ĉirilate vi estas amike petata reelegi artikolon de Mihály *Gergely* en 1976/6, paĝo 19, pri *Csontváry.*

**konfronti:* Kunfronti, kontraŭstari.

Korespondi deziras

Aktoroj, junaj kontaktus kun pers. teatraj: SU—194 156, *Leningrád,* Nejinskaja 4, kv. 113, Viktor *Goštejn.* — Maŝinisto, el Bratsk, pĉt: V. P. *Ŝervin,* 665 737, *Viĥorevka,* Mastosteitelnaja 4. — inĝ. B. A. *Granat,* pĉt: 394 026, *Voroneĵ,* str. 27. L. 25 — Studento Sergej *Pavlenko,* popmuziko, turismo, diskoj: 455 023, *Magnitogorsk,* Oktobrskaja 28/110. — E-grupanoj pri interesoj (hobioj div.: Interklubas Esp. Sürlu gamykla, *Kédainiai,* Litova SSR, 235 030.

Muziko, sporto, turismo; ŝanĝi bk, pm, diskojn *deziras:* f-ino Katalin *Fogarasi* (20), H—4551 *Oros,* Vasvári P. 7. — Miecz. *Porowski,* (30), PL—45—774 *Opole,* ul. Dambonia 133/15. — Roman *Jarosz* (20) studento, PL—23—305 *Chrzanów.* — Mária *Uherčiková* (24), CS—900 83 *Čataj* 125. okr. Bratislava (artaj brodaĵoj!). — Frieder *Gümmel* suboficiro (18) kun hung. geknaboj, DDR—65, *Gera* Pf. 36 264. — Rosica *Stankova* (18) kun hung.: BG—9200 *Provadia,* C. Todorov. 66. — Rik. Ciŝlik (23) PL—59—414 *Dobromierz,* Kóścielna la. — Henryk *Porowski* (22, intrs.) PL—45—701 *Opole,* Wroclawska 52/8. — inĝ. Andrzej *Czyz* (26) PL—41902 *Bytom,* str. B. Prusa 17/6. — Tadeusz *Duszdz* (21) 42—575 *Katowice* Strzyzowice, Belna 82. — Joan *Vajda* (28, komputisto) R—2200 *Braŝov,* Dupä 44.

E-stilistiko, novel-arto, poezio, kun seriozaj kritikantoj: *Itoo* Hideharu, matem. studento (21), *Tokio 171,* Yanai-kata, 3—20 Chihaya-cho, Toshima-ku. — Pri *Kalevala* kun finnoj: A. *Gajdos, Cluj* (Rum.) str. Padin 9—13. Bl—D10, ap. 65. — Mária *Farkas* (32, flegistino) pĉt. H—6900, *Makó,* Hunyadi u. 22. — Blinduloj kaj vidantoj (diversjar.) el Sardinio: I—099100 *Cagliari,* Fra Ignazio 100, Sc. St. Istituto Ciechi (certe resp.!) — S-ino Győzőné *Gaál* (24) bk. ĉt. kun Afriko, Brazilo, Japanio, H—4031 *Debrecen, Krónikás* D/f. 6. — 30 anoj (16—45j.) pĉt: BAK Esp-o rondo, DDR—20, *Neubrandenburg,* An der Linde 2.

Kun svedoj korespondi, skribu al: Redakt. ins. *Expressen,* S—105 16, *Stočkholm.* Validas ĉiam.

HUNGARA VIVO

Čefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaky-Nagy, Zsuzsa Varga-Haszonits

Čefkunlaborantoj:
Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: D-ro Péter Suth direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, če la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

77-1792 Somogy m. Nyomda 3350
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

La Fridujfabriko ampleksigis la serion de mastrumaj fridujoj.
Jen la du unuaj tipoj de la nova produktaj-familio:

1. 160-litra, dustela-, kun 18 litra ultrafridigejo ĝis —12 °C; produktita surbaze de BOSCH—licenco; prezo: 5170,— Ft.
2. 200-litra, dustela, kompresora fridujo-, kun 18 litra ultrafridigejo ĝis —12 °C; prezo: 5640,— Ft.

Fabrikas: Hűtőgépgyár

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért